MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

5
1985
16,-Ft

Pri programoj por via libera tempo, pri enlandaj ripozebloj, pri kulturaj eventoj informas Vin

Turisma Informservo TOURINFORM per la telefonnumero 179-800, aŭ persone en la Oficejo TOURINFORM (Budapest, V., Petőfi Sándor u. 17/19./

TOURINFORM:

INFORMOJ PRI MULTAJ LOKOJ EN UNU LOKO

- Reguloj pri dogano, devizoj, pasporto, vizoj; limtrapasejoj
- Adreso kaj telefonnumeroj de vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, hotelaj kaj restoraciaj entreprenoj
- Restoracioj, trinkejoj, amuzejoj
- Muzeoj, artmemorajĵoj, naturprotektaj teritorioj
- Kuracbanejoj, plaĝoj
- Vojaĝoj per fervojo, sur ŝoseo, en aero
- Speciala meteorologia servo
- Poŝtaj servoj

		Per telefono	Persone
En la lingvoj hungara,	labortage	7-21 h	8-20 h
germana, angla,	sabate	7-20 h	8-20 h
rusa kaj franca	dimanĉe	8-13 h	8-13 h

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség. Felelős kiadó: Vaskó Tibor. Készült a Magyar Eszperantó Szövetség Házi Sokszorosítójában. Felelős vezető: Szabó Imre. Budapest, 1985. július. Törzsszám: hearota 85-021[illegible]. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben ös a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V. József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft , fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft. Megjelenik kéthavonta.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXVa jaro, 1985 n-ro 5
(123)

ENHAVO

Festivalo en Moskvo 162
Kongresa semajno en Aŭgsburgo 164
Tonkin, H.: „La mondo dividu kun ni tiun miraklon..." 166
Márkus G.: Interkibernetik '85 168
Princz O.: Lingvotendaro apud Balatono 169
Szabó I.: Dinnyés, la kanto-posedanto 170
Kantoj de József Dinnyés 173
László I.: Departemento Pest 174
Originala Poezio 177
Nemere I.: La trezoro 5. 178
Panoramo 182
Benczik M.: Mirindaj ombroj en la pupteatro 182
Poemoj de Attila József (*I. Szabó*) 183
Gerelyes E.: Kaino (*V. Szabó*) 184
Garai G.: Jarcentfino (*I. Szabó*) 187
Bálint Sz.: La neatendita evento 188
Beŝŝenyei T.: La hazardo 189
Heltai J.: Millicent (*J. Podani*) 190
Sutton, G.: Harry Harrison: sukcesa verkisto de sciencfikcio kaj esperantisto 192
Recenzoj 194
Fenyvesi E.: Gaja paĝo 198
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 199
Korespondi deziras 200

Sur la frontpaĝo: foto de Irja Miettinen

Sur nia frontpaĝo...

oni vidas foton, kiu prezentas belan kolekton de nacikostume vestitaj pupoj. La aŭtoro de la foto estas f-ino Irja Miettinen el Finnlando – ŝi fotis la propran kolekton, kiu fakte estas tre tipa por esperantista hejmo.

Verŝajne multaj tiaj kolektoj riĉiĝis dum la ĵus pasinta somero je unu aŭ eĉ pluraj pupoj, ja esperantistaj aranĝoj okazis amase en multaj landoj.

Sur la sekvaj paĝoj ni aperigas artikolojn pri pluraj someraj aranĝoj, pri la Festivalo en Moskvo – kiu ja havis ankaŭ esperantistajn programojn –, pri la Universala Kongreso en Aŭgsburgo, pri lingva tendaro ĉe Balatono, pri prezentado de japanaj pupistoj en Budapeŝto, kaj tio estas nur parto de la efektive okazintaj someraj aranĝoj. Leginte la raporton pri la UK en Aŭgsburgo, oni nepre legu ankaŭ la kongresan paroladon de d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, kiu lanĉas plurajn ideojn, kaj tiras atentindajn konkludojn, interesajn ne nur por la tieaj kongresanoj.

Intervjuo kun la hungara kantisto József Dinnyés povas interesi ne nur muzikamantojn: liaj kantoj enhavas pensojn kaj sentojn tre korproksimajn por esperantistoj. Ni deziras al li sukcesan debuton en Esperantujo.

En nia n-ro 3/1985 ni havis intervjuon pri sciencfikcia temo el Sovetio; nun ni havas similan intervjuon kun usona sciencfikcia verkisto, kiu estas esperantisto.

En tiu ĉi numero ni finas nian serion pri la 19 hungaraj departementoj per artikolo pri la centra Departemento Peŝt.

Hungaran literaturon reprezentas en tiu ĉi numero longa, eble iom morna novelo de Gerelyes, kaj multe pli serena prozaĵo de J. Heltai, krome poemoj de A. József kaj G. Garai. Troviĝas ankaŭ pluraj pecoj de la Esperanta literaturo.

Kaj fine io **nepre** legenda: informo sur la paĝo 179 pri tio, ke la Hungara Radio denove ekparolis en Esperanto!

FESTIVALO EN MOSKVO

La 27-an de julio, posttagmeze je la kvina horo en Moskvo komenciĝis la 12-a Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj. La reprezentantoj de la junularo de la partoprenintaj 150 landoj havis paradan defilon, ĉekape kun la membroj de la internacia prepara komitato de la Festivalo. La vicon de la naciaj delegitaroj malfermis la gejunuloj el Kubo – laŭ la tradicio la unuan lokon havas la organiza lando de la antaŭa Festivalo – kaj poste sekvis la delegitaroj el la ceteraj landoj, laŭ la ordo de la rusa alfabeto. En aparta kolono defilis la reprezentantoj de la internaciaj kaj religiaj organizaĵoj; estas notinde, ke ankaŭ Tutmonda Esperantista Junulara Organizo sendis reprezentantojn al la Festivalo.

La dekduan fojon por la paco

La ideo de la Festivaloj naskiĝis tuj post la fino de la terura dua mondmilito. La unua Festivalo okazis en Prago (Ĉeĥoslovakio), en ĝi partoprenis 17 mil homoj el 71 landoj de la mondo. Post du jaroj en Budapeŝto (Hungario) renkontiĝis 20 mil reprezentantoj de la junularo de 82 landoj. La tria Festivalo okazis en Berlino, en la jaro 1951: tie kunvenis 26 mil gejunuloj el 104 landoj. Kaj sekvis en 1953 Bukareŝto (30 mil personoj el 111 landoj), en 1955 Varsovio (31 mil delegitoj el 114 landoj), en 1957 Moskvo (34 mil gejunuloj el 131 landoj), en 1959 Vieno (18 mil gastoj el 112 landoj), en 1962 Helsinki (18 mil delegitoj el 137 landoj), en 1968 Sofio (20 mil partoprenintoj el 138 landoj), en 1973 denove Berlino (30 mil partoprenantoj el 140 landoj), en 1978 Havano (18 mil gastoj el 145 landoj). La 12-an Festivalon en Moskvo ĉisomere partoprenis 20 mil gejunuloj el 150 landoj, por esprimi sian pacovolon per la demonstro de la amikeco, kiu senvelke vivas en la junularo, sendepende de nacieco, haŭtkoloro aŭ ideologia konvinkiĝo.

«Por kontraŭimperiisma solidareco, paco kaj amikeco!»

VLADIMIR AKSJONOV,

PREZIDANTO DE KOMITATO DE JUNULARAJ ORGANIZOJ DE USSR

Eldonejo de Presagentejo Novosti (APN)
Moskvo, 1985

Esperantlingva eldonaĵo pri la Festivalo

Por ekkoni unu la alian

La kerna penso de la Festivalo en Moskvo – kiel ankaŭ de la antaŭaj tutmondaj renkontiĝoj de la junularo – estis tre simpla: la gejunuloj de la mondo ekkonu unu la alian pli bone. Tio povas multege kontribui al la firmigo de la internacia paco, ja se la gejunuloj povas akiri senperajn spertojn pri siaj alilandaj samaĝuloj, ili komprenos, ke ankaŭ tiuj deziras por si feliĉan vivon en paco. La partoprenantoj de la Festivalo havis amason da ebloj konatiĝi unu kun la alia: unu el tiuj ebloj estis la tn. „libera forumo", kie iu ajn povis publike diri sian opinion pri ajna temo, en ajna lingvo. Tiel la Festivalo kreis fakte unikan eblon por interŝanĝo de opinioj, pridiskuto de la problemoj de la junularo en diversaj landoj, kaj pro la fakto, ke en la Festivalo reprezentiĝis 150 landoj, en la diskutoj povis aperi tre diversaj vidpunktoj pri multaj gravaj problemoj. Tamen, pri almenaŭ unu demando regis absoluta konsento inter la 20 mil festivalanoj: pri tio nome, ke nova milito alportus katastrofon al la homaro, kaj estas nepre necese, ke la grandegajn sumojn, kiujn la mondo nuntempe elspezas por armiloj, oni uzu por pacaj celoj. La festivalanoj konstatis, ke tiaj celoj abundas: oni povus efike helpi la evolulandojn, oni povus likvidi malsaton kaj mizeron, elimini malsanojn kaj protekti la homan medion.

Hungara kulturvespero

Pluraj naciaj delegitaroj prezentis al la festivalanoj nacian kulturvesperon. Tion faris ankaŭ

hungaroj la 30-an de julio. En la kulturprogramo – kiu okazis antaŭ plenŝtopita spektejo – estis prezentita la vivovojo de la du grandaj hungaraj komponistoj Béla Bartók kaj Zoltán Kodály. La dua parto de la programo estis dediĉita al la hungara popkaj rock-muziko, kaj fine sekvis moderna baletspektaklo en la plenumo de la baletensemblo de la hungara urbo Györ.

La hungaraj partoprenantoj kontribuis tre aktive al multaj programoj de la Festivalo. En la hungara delegitaro partoprenis ankaŭ ĉ. dudeko da junaj hungaraj esperantistoj, konvene al la alvoko, aperinta en la esperantlingva broŝuro „Renkonte al la 12a Tutmonda Festivalo".

La signifo de la Festivalo

La unua sekretario de la Hungara Komunisma Junulara Asocio, Csaba Hámori jene resumis la signifon de la Festivalo: „Antaŭ ĉio: estas malfacile trotaksi la signifon de tio, ke en la nuna malfacila internacia situacio post sepjara paŭzo denove renkontiĝis la junularo de la mondo. La unika atmosfero de la festivalaj aranĝoj donis grandan impulson al la kunlaborado de la pacamaj gejunuloj. Estas historia sperto, ke la favoraj eventoj de la internacia politiko povas helpi la ŝancojn de la malstreĉiĝo kvazaŭ fortigante unu la alian. Ni kalkulas pri tio ankaŭ nun, ĉar la Festivalo tempe koincidas kun la festa kunsido okaze de la 10-a jubileo de la subskribo de la Akto de Helsinki, kaj kun la unuflanka decido de Sovetio ĉesigi la eksperimentajn nukleajn eksplodigojn post la 6-a de aŭgusto. Mi esperas, ke ni povos rerigardi al la nuna jaro, kiel al jaro fortiginta la pozitivajn tendencojn de la internacia politiko..."

Amika kunveno de hungaraj kaj vjetnamiaj gejunuloj en la hungara studenta klubo dum la Festivalo

Kongresa semajno en Aŭgsburgo

Aŭgsburgo havas gravan lokon ankaŭ en la frua historio de la hungara popolo: en la jaro 955 ĉi tie havis decidan malvenkon la hungaraj taĉmentoj dum sia rabturneo. Tiu ĉi malvenko donis esencan stimulon al la procezo, kiu en la jaro 1000 kondukis al la fondiĝo de la hungara feŭdisma ŝtato.

Nun pli ol 60 hungaraj esperantistoj kun pli pacaj celoj veturis al Aŭgsburgo, kaj ili signife kontribuis al la sukceso de la 70-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis pli ol 2300 kongresanoj el 58 landoj. La plej multe laborinta hungaro certe estis la pianistino Erika Becht, kiu akompanis ĉiujn – multnombrajn – gekantistojn, kiuj rolis en la diversaj programoj.

La Solena Inaŭguro okazis en la Sporthalo de Aŭgsburgo: festparolis d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA. Lian paroladon oni povas legi sur la sekvaj paĝoj.

La ĉeftemo de la 70-a UK estis: „Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi? " Tiu temo prezentis interesan kadron por viglaj diskutoj, kiujn gvidis sprite kaj lerte William Auld.

Granda publiko vizitis ankaŭ la prelegojn de la Internacia Kongresa Universitato kaj tiujn de la Esperantologia Konferenco. IKU havis prelegantojn el Ĉinio, FRG, Hungario, Israelo, Jugoslavio, Norvegio kaj Usono, la Esperantologia Konferenco el FRG, GDR, Hungario, Nederlando kaj Venezuelo. La centra temo de la Konferenco estis „Pasinteco kaj estonteco en la evoluo de la lingvo Esperanto."

Aparte sukcesa dumkongresa aranĝo estis „La Tago de la Paco", kiu okazis la 5-an de aŭgusto. En la kadro de tiu aranĝo okazis la Esperanta premiero de la infana teatraĵo de „La Ludo de la Paco" de Bernard Benson, en la plenumo de germanaj infanoj,

La Kongresejo – la Kongreshalo de Aŭgsburgo



W. Auld kaj Chun-chan Yeh, tradukisto kaj aŭtoro de „La montara vilaĝo"

Lina Gabrielli kun Edwin de Kock, kiu la unuan fojon aperis en Eŭropo

premiero de la scena versio de la novelo „La Aŭgsburga Kretocirklo" de Bertolt Brecht, en konvinke puritana prezento de Bulgara Esperanto-Teatro, la politika parodia skeĉo „La Pinto" de Stefan Maul, kaj la memorkunsido pri Hiroŝima kaj Nagasaki, kiun partoprenis 120 kongresanoj. Tiu ĉi kunsido proponis al UEA fari „La Tagon de la Paco" konstanta programo de la estontaj UK-oj. Al tiu ĉi temo ligiĝas ankaŭ la sukcesa kunveno, ki n havis la 9-an de aŭgusto Mondpaca Esperantista Movado.

La ĉefa teatra evento de la Kongreso estis la komedio „Tri viroj en neĝo", de Erich Kästner, kiun prezentis vigle kaj amuze bulgara Esperanto-Teatro. La kongresanoj per granda aplaŭdo elmontris sian ŝaton. Havis agrablan etoson ankaŭ la Muzika Ves-

Gregoire Maertens en la urbodoma akcepto





Du gajnintaj deklamintoj de la Infana Kongreseto

pero kaj la Internacia Arta Vespero – en tiu lasta rikoltis merititan sukceson la hungara kantistino Anna Kiss.

Hans Breuer, la ĉefurbestro de Aŭgsburgo akceptis en la urbodomo 200 reprezentantojn de la kongresanaro. En sia parolado li emfazis, ke la individua toleremo inter „simplaj civitanoj" estas la plej grava antaŭkondiĉo por la „granda paco".

Apartaĵo de la Aŭgsburga kongreso estis la ĉeesto de tre multaj reprezentantoj de la Esperanta kulturo. Ĉeestis Gaston Waringhien, William Auld, Juan Régulo-Pérez, Reto Rossetti, Tibor Sekelj, kaj la unuan fojon oni povis renkonti en Eŭropo la faman Sud-Afrikan poeton Edwin de Kock. Post multjara foresto aperis ankaŭ la konata esperantologo Ulrich Lins, ĉefredaktoro de la preparata nova eldono de la Enciklopedio de Esperanto. (Tamen estas dubinde, ĉu tiu verko baldaŭ aperos en la libroservaj ofertoj...)

Dum la Kongreso la Komitato de UEA havis siajn kutime longajn kunsidojn. Ĝi akceptis multajn decidojn, inter kiuj eble la plej interesa estas eksperimento pri nova membrokategorio „Membro kun Gvidilo" (MG). La MG-kotizo estos ĉ. triono de la MJ-kotizo: por ĝi la membro ricevos 80-100 paĝan depresaĵon de la Jarlibro de UEA kaj estos plenrajta individua membro de la Asocio.

La kongresanaron ĉiutage informis la kongresa gazeto „La Strobilo", kiun redaktis la teamo de „Monato" sub la gvido de Stefan Maul.

Resume: en Aŭgsburgo oni povis sperti agrablan kongreson, en bona etoso, kun riĉa programo.

Mezepokstile vestita knabino en la Urbodomo



„La mondo dividu kun ni tiun miraklon...”

La festparolado de d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Karaj Gekolegoj,

La poetoj instruas, laŭ la vortoj de nia senmorta poeto Kalocsay, ke „la tempoj grandas kaj la homoj etas.” Ni kunvenas ĉi-jare por pridiskuti la kongresan temon „Antikvo kaj moderno: Kion ŝanĝi, kion konservi? ” Nia rigardo do turniĝos al la paso de la jaroj, kaj al la efiko de la historio ĉe la homoj.

Estas taŭge, ke ni faru tion ĝuste en Aŭgsburgo. Tie ĉi, antaŭ dumil jaroj, la Romiaj generaloj Drusus kaj Tiberius starigis fortikaĵon. Tiu fortikaĵo, situita sur la ĉefa komerca vojo inter Adriatiko kaj la Norda Maro, rapide fariĝis prospera urbo. Oni nomis ĝin Augusta Vindelicorum, la fortikaĵo de Augustus en la lando de la vindelikoj, la loka kelta tribo. Homoj venis-iris; la urbo kreskis. En Mezepoko kaj Renesanco, do kvarcent, kvincent, sescent jarojn antaŭ la hodiaŭa tago, ĝi fariĝis unu el la plej riĉaj urboj en tuta Eŭropo. Ĝiaj regantaj familioj tenis en la manoj grandan parton de la eŭropa komerco, kaj ankaŭ pli kaj pli de la komerco ekster Eŭropo. Ĝiaj grandaj preĝejoj iom post iom konstruiĝis, komence de la 17-a jarcento estis starigita ĝia urbodomo, unu el la juveloj de la arkitekturo de la malfrua Renesanco norde de la Alpoj.

Ne necesas rakonti la detalojn de tiu ĉi historia urbo: ilin vi povos mem eltrovi per via promenado tra ĝiaj stratoj. Vi povos mem rigardi la domojn, kiujn vidis la granda pentristo Holbein, kiu mem helpis beligi sian gepatran urbon, kaj kies filo, kiu atingis eĉ pli grandan pentristan famon, kvazaŭ fondis la anglan skolon de pentrado. Tiu ĉi estas ankaŭ la urbo de Leopold Mozart, kaj, en nia propra epoko, de Bertolt Brecht.

Aŭgsburgo, karaj gekolegoj, estas urbo, forte ligita al milito kaj paco. La riĉaĵoj de Aŭgsburgo financis multajn militojn tie ĉi kaj en foraj landoj, kaj la urbo mem submetiĝis jen kaj jen al la kruelaĵoj de militado – neniam pli ol en 1944, kiam la industrio de tiu ĉi urbo iĝis ĝin ĉefa celo de la bomboj de la Dua Mondmilito, kaj la Urbodomo kaj multaj aliaj konstruaĵoj fariĝis malplenaj ruinoj.

Skribis latina poeto „Iam seges est, ubi Troia fuit”, nun estas kampoj kie iam estis Trojo, tiel sugestante, ke la gloroj de la granda urbo Trojo pasis, sed antaŭeniras la naturo, kiu reproprigas la kreaĵojn de la homo kiam venas la tempo por fari tion. Tio ne okazis al Aŭgsburgo. Aŭgsburgo reviviĝis. La urbo, kiu nun atendas vin, denove brilas. Tamen, ĝi konservis, eĉ ŝirmis, sian historion, farante elektojn inter kion konservi kaj kion ŝanĝi. Tiel la novo kaj la malnovo sidas unu apud alia, kaj la malnovaj stratoj eĥas je la sonoj de moderna vivo. Aŭgsburgo estas kvazaŭ modelo de la dilemo de nia kongresa temo: „Kion ŝanĝi, kion konservi? ”

La jaro 1944 markis la finan stadion en milito, kiu, pli ol iam ajn antaŭe, ne estis limigita al la batalkampoj, sed detruis la simplajn enloĝantojn de grandaj regionoj de Eŭropo kaj Oriento, forigante samtempe iliajn monumentojn, iliajn institucioj n, iliajn morojn. Sed tio, kio okazis en Aŭgsburgo en 1944, kaj la ruinoj de la milito tiel kreitaj, simbolis eraon jam pasantan. Ja kreskis herbaĵo inter la ŝtonoj de Aŭgsburgo: ja minacis reakiri ĝin la fortoj de la naturo.

Sed unu jaron pli poste, nova erao de militado komenciĝis – erao, en kiu mortas ne nur la homoj, sed ankaŭ la herbaĵoj, ne nur la fragila karno, sed la naturo mem. En 1945, ĝuste en tiu ĉi sezono, falis sur la japanajn urbojn Hiroŝima kaj Nagasaki la unuaj atombomboj. Malfermiĝis epoko, en kiu la plej teruraj teruraĵoj de antaŭaj jaroj estis kvazaŭ tutmondigitaj, kvazaŭ universaligitaj. La homo lernis ne nur detrui siajn malamikojn, ne nur detrui sin mem, sed eĉ detrui la planedon, kies aeron ni spiras, kies akvon ni trinkas, kies tero nutras nin. Malfermiĝis ankaŭ la plej terura konkurenco pri armiloj, en kiu neimageblaj sumoj estas elspezataj, ne nur por nukleaj armiloj, sed ankaŭ por alispecaj

armiloj. Tiuj sumoj elpeziĝas en preskaŭ ĉiu lando en nia hodiaŭa mondo. Inter la du grandaj mondpotencoj ekestis konkurenco nur por teni la du landojn en stato de egaleco, malgraŭ tio, ke la rakedoj posedataj eĉ de unu tia potenco povus detrui dekon, eĉ centon da mondoj. La sumoj investitaj je armiloj, karaj gekolegoj, estas en plej bona okazo sumoj forĵetitaj – se la armiloj ne estos uzataj. Kaj se ili uziĝos, la neta perdo povos esti eĉ katastrofa por nia estonteco.

Rigardu vian najbaron. Estas bona ebleco, ke vi, per viaj impostoj kaj via laboro, kontribuas ĉiujare pli grandan sumon por detrui vian najbaron, ol vi elspezis por veni al tiu ĉi kongreso. Kaj same estas bona ebleco, ke via najbaro elspezas pli da mono por detrui vin ol por komunikiĝi kun vi. Ĉi tie ne temas pri dekstra politiko aŭ maldekstra politiko, pri la misfaroj de unu lando aŭ alia, sed pri tio, ke ni ĉiuj, do la tuta homaro, misuzas la riĉaĵojn de nia tero por semi malamikecon kie devus esti amikeco, morton kie devus esti vivo, malakordojn kie devus esti kunlaboro. Ĉu vere tiu idealo menciita en la Himno de Zamenhof, ke la popoloj faru „en konsento" harmonian rondon, estas vere ne atingebla? Ĉu vanas nia idealo? Tio ne povas esti. Interkompreniĝo nepre plibonas ol interbatalado, kaj tiu ĉi bela kongreso estas nepre pli pozitiva kontribuo al la progresigo de la homaro ol armila konkurenco kaj reciproka akuzado.

La jaro 1945 ja ne estis nur jaro de katastrofoj. Ĝi markis la finiĝon de tiu milito, kiu tordis la korojn de la homoj, detruis parencojn, detruis infanojn, detruis urbojn. En konferenco en Sanfrancisko naskiĝis la ideo krei novan internacian organizon, kiu malhelpu, ke la teruraĵoj de la Dua Mondmilito iam ajn denove okazu. Tiu organizo de Unuiĝintaj Nacioj baldaŭ fariĝis la ĉefa reguliganto kaj kunordiganto de la internacia vivo. Ĝiaj organoj, eĉ se ili ne malebligis la militon, almenaŭ donis forumon por unue diskuti la internaciajn disputojn, anstataŭ tuj mortigi. Ĝiaj fakaj instancoj nutris la malsatantojn, helpis la farmistojn, edukis infanojn, laboris kontraŭ analfabeteco, aktivis por redukti la maljustaĵojn kaj la kruelaĵojn, kiuj ankoraŭ tro multe abundas en nia hodiaŭ mondo. Ke ili ne plene sukcesis, tion ni bone scias. Ke Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj la aliaj instancoj foje montriĝas senpotencaj, aŭ foje ne sukcesas alfronti la plej malfacilajn demandojn, tion ni ankaŭ bone scias. Ni kompreneble bone scias, ke ĝi ne solvis sian propran lingvan problemon, nek traktis adekvate la problemon de lingva egaleco kaj lingva diskriminacio ĝenerale. Tamen ni devas agnoski, kaj indas agnoski, en tiu ĉi periodo en ĝia historio kiam Unuiĝintaj Nacioj estas pridubata kaj atakata de multaj homoj, ke ĝi estas unu el niaj plej grandaj garantiiloj de paco, ke por solvi internaciajn problemojn oni turnos sin unue al vortoj anstataŭ fortoj, kaj al debato anstataŭ disbato. Kvardek jarojn post ĝia fondiĝo ni do salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj agnoskas ĝin kiel fratan organizon en la serĉado de internacia kompreniĝo, de internacia paco.

La paso de la jaroj portis al ni bonon kune kun la malbono, sukceson kune kun la malsukcesoj. Unu el tiuj plej grandaj sukcesoj estas ĝuste nia Universala Esperanto-Asocio, ĝuste nia lingvo Esperanto. Ni estas nun ĉe la sojlo de ĝia centjariĝo. Kaj ni laboras diligente por sukcesigi nian jubileon. Apud dumiljara ekzisto, karaj urbanoj de tiu ĉi kongresa urbo, eble cent jaroj ŝajnas malmulto. Sed la atingoj de Esperanto tra tiuj cent jaroj, la miraklo de ĝia ekzisto, ĝia potencialo por la estonteco – ĉio ĉi igas ĝin unu el la plej geniaj eltrovaĵoj de nia epoko kaj unu el la malmultaj inventaĵoj kies sola ekzistokialo, sola idealo, estas krei interkompreniĝon. „La tempoj grandas kaj la homoj etas." Jes ja. Sed nun, ekde 1945, estas la homoj, kiuj decidos, ĉu nia planedo vivos aŭ mortos, ĉu la homaro pludaŭros. Ĝia plej bona armilo kontraŭ la propra detruo estas certa paca armilo. Ĝia plej bona ŝirmilo estas certa paca ŝirmilo. Ĝi ne detruas la homojn en la stratoj. Ĝi ne dissemas malamon kaj suspekton. Tiu armilo, tiu ŝirmilo, karaj gekolegoj, estas el nuraj vortoj, kaj el fragilaj frazoj. Sed ĝia mesaĝo estas pli potenca ol ĉiuj armiloj, kaj ĝi ŝirmas nin pli sekure ol la plej forta ŝirmejo. Ĝi estas nia Internacia Lingvo, nia Esperanto!

La mondo dividu kun ni tiun miraklon. Ĝi vidu kio estas atingebla per la simpla interkompreniĝo. Nenio, karaj kolegoj, estas pli forta ol homa lingvo, saĝe uzata. Estas nia devo, nia sankta devo, en ĉi murdepoko disvastiĝi tiun lingvon kaj ĝin alporti al la homaro.

Estu salutata, Aŭgsburgo! Estu salutataj, kongresanoj de la 70-a Universala Kongreso de Esperanto! Estu sukcesa kaj fruktodona nia semajno!

INTERKIBERNETIK '85

TAKIS (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informatiko kaj Sistemiko) en Budapeŝto aranĝis sian unuan kongreson, nomitan INTERKIBERNETIK '85. La evento okazis de la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto. La gastiganto de tiu ĉi aranĝo estis Societo pri Komputscienco „Johano Neumann", sed la organizadon subtenis ankaŭ la Internacia Asocio pri Kibernetiko, havanta sidejon en Namur (Belgio) kaj Kibernetika Akademio en Milano (Italio).

TAKIS estiĝis antaŭ du jaroj. Celo de ĝia organizado estis antaŭenigi la aplikadon de Esperanto kiel de neŭtrala konvencia lingvo, en la sciencterenaj kontaktoj. Per tio la Asocio volas kontribui al plifortigo de la internaciskalaj kontaktoj en la scienco.

La programkomisiono akceptis proksimume 50 prelegojn el inter la pluraj, senditaj el diversaj landoj de Eŭropo, Azio kaj Ameriko. Eĉ el Brazilo, Ĉinio, Kanado, Vjetnamio, venis manuskriptoj de prelegoj..

La inaŭguro de la Kongreso okazis en la Centro de firmao SZÁMALK (Entrepreno pri Aplikado de Komputado) la 29an de julio. Ĉi tie, antaŭ la unuaj plenkunsidoj, László Jéki, vicprezidanto de MTESZ (Asocio de Teknik- kaj Naturciencaj Societoj) salutis la kunvenintojn, poste en la nomo de akademiano Tibor Vámos, d-ro János Szelezsán, la vicĉefsekretario de Societo „Johano Neumann", transdonis la memormedalon de la Societo al Profesoro d-ro Helmar Frank, vicprezidanto de TAKIS. Profesoro Frank iĝis la unua ne-hungara fakulo pri informatiko, ricevinta la memormedalon, fonditan antaŭ dek jaroj.

Post la inaŭguro dum la unua plenkunsido la partoprenantoj aŭskultis tri ĝeneral-temajn prelegojn. D-ro Helmar Frank en sia prelego montris rilatojn de la kibernetiko kaj la lingva revolucio. Poste okazis vigla diskuto; D-ro Jean Ramaekers analizis la interrilatojn de la informatiko kaj la socio. D-ro Robert Vallée, katedestro de la Universitato Paris-Nord, parolis pri kunligoj de la parolataj lingvoj kaj iliaj transformiĝoj kiel kompleksaj sistemoj.

Post la menciitaj prelegoj okazis la ĝenerala kunsido de TAKIS, dum kiu estis elektita la nova estraro de la Asocio.

El la prelegoj de la kvar laborsekcioj (ĝenerala kibernetiko, antropokibernetiko, inĝeniera kibernetiko, biokibernetiko) plej multaj okupiĝis pri la lingvokibernetiko, ekzemple pri teksto-prilaborado kaj pri la teksto-tradukado, subtenita de komputilo. La aktualecon de tiu ĉi tereno donas, ke en la evoluintaj landoj de Okcidento la plej dinamisme disvastiĝanta tereno de la aplikado de komputscienco estas ekde pluraj jaroj ĝuste la prilaborado de tekstoj. Sed la sama tereno de esplorado ludas centran rolon en Japanio, en la programo de kvinageneracia evoluiga programo, celanta krei informadajn sistemojn surbaze de scio.

La prelego, renkontita kun la plej granda intereso dum la Kongreso estis tiu de profesoro Chen Yuan, direktoro de la Instituto pri Aplikita Lingvistiko de la Akademio de Sciencoj de Ĉinio.

Akademiano Chen pruvis, ke la kvanta analizo de la moderna ĉina lingvo, pri kio oni intense okupiĝas en la Instituto de li estrata, ludos gravan rolon en la modernigo de lia patrio, precipe en la tereno de la tekniko pri la informo-prilaborado. Konvene al tio la specialistoj pri lingvistiko kaj informatiko laboras kune pri la programoj de esplorado. En la sama sekcio prelegis B.C. Papegaaij (Nederlando) pri la semantikaj problemoj de la dividitaj traduksistemoj de lingvoj. Temas pri programo, celanta uzi Esperanton, kiel pontolingvon en la tradukado de tekstoj el diversaj lingvoj en diversajn lingvojn. La grupo de scienculoj, okupiĝanta pri problemoj de semantikumado kaj tradukado – kiel sciate – ricevis kvin milionojn da Usonaj dolaroj de la Eŭropa Komunumo por estigi unuecan traduksistemon, subtenitan de komputilo. La kialo: en EK lingvo de ĉiu partoprenanta ŝtato estas oficiala laborlingvo, tial la elspezoj pri tradukado, interpretado kaj dokumentado estas enormaj.

Post la prelegoj interesa detalo de la aranĝaĵo estis demonstraĵo fare de komputisto Lajos Mohai en la terminalejo de SZÁMALK. Dum tiu evento ĉiu partoprenanto persone povis konvinkiĝi pri tio, ke la sistemo de teksto-tradukado krom malgravaj eraroj stilaj kun alta fideleco tradukis frazojn meze

Prof. Hermann Frank prelegas

malfacilajn de Esperanto en la hungaran.

En la sekcio pri biokibernetiko du prelegoj vekis pli ol ĝeneralan atenton. El la du prelegintoj unu estis D.L. Velkov (Bulgario), okupiĝanta pri kibernetikaj aspektoj de la modelo pri mem-organizado de la molekulo. La dua estis d-ro András Farkas (Hungario), kies psiĥo-kibernetika modelo havis titolon „Kontraŭdiro kaj Semantiko en la Problemsolvado".

Post la Kongreso profesoro d-ro H. Frank el la universitato de Paderborn (FR Germanio) rakontis: „Kvankam la kibernetiko ekis, kiel pontoscienco, ĝis la nuntempo ĝi jam fariĝis memstara scienco. Sed okazis ankaŭ tio, ke la partoj de tiu ĉi scienco, specifikizitaj altnivele, iĝis memstaraj terenoj, inter kiuj malstriktiĝis la kontaktoj.

Dum la Kongreso oni povis sperti, ke aperis la konturoj de ebloj pri sciencterena kunlaboro interkontinenta. Tio estas realo en pluraj kampoj, laŭ la prelegoj, okazintaj en INTERKIBERNETIK '85.

Pruviĝis ankaŭ tio, ke la aplikado de komputiloj multe evoluis lastatempe en la pedagogio, precipe en la franclingvaj regionoj de la mondo (Francio, Kanado). Ni ne eraris do, kiam al la angla kaj la Esperanta lingvoj ni aligis kiel trian laborlingvon de la Kongreso la francan. Ni spertis, ke ankaŭ la ne-franclingvanoj ofte uzis la francan kiel laborlingvon. La kvarono de la prelegoj okazis en tiu idiomo. Menciinde, ke pluraj prelegis en la Kongreso esperantlingve, pli multaj ol angle. Pluraj anglalingvaj prelegantoj opiniis, ke la lingva nivelo de la prelegoj en la ILo estis pli alta ol de tiuj en la angla.

Interesa estas la ekzemplo de la polino Lozowicka Stupnicka, ano de Internacia Asocio pri Kibernetiko. Ŝi dum pluraj jaroj parolis franclingve en diversaj kongresoj. Pasintjare en San Marino ŝi ellernis Esperanton, kaj kvankam ŝi ankaŭ ĉi tie prelegis france, ŝi resumis la prelegon esperantlingve. Poste s-ino Stupnicka konfesis: laŭ ŝia sperto por ŝi Esperanto ŝajnas jam pli taŭga kaj oportuna rimedo por esprimi la pensojn, ol la franca. Resume ĉion, laŭ mia sperto – diris d-ro H. Frank – la 1a kongreso de TAKIS, INTERKIBERNETIK '85 estis vere sukcesa. Al tio multe kontribuis la Hungarlanda organiza komitato, Societo „Johano Neumann" kaj la Operativa Organiza Komitato sub la gvidado de ges-roj d-ro Péter Broczkó kaj Mária Tóth."

La estraro de TAKIS decidis: antaŭ la sekvaj konferencoj en Namur aranĝi ne unu, sed du kongresojn: en 1987 en Žilina (Ĉeĥoslovakio) kaj en 1988 en Taragona (Hispanio).

Tiumaniere, la ĉijara kongreso en Budapeŝto estis ne nur unu el la multaj sciencaj kunvenoj de la mondo, sed ankaŭ komenco de nova serio de kongresoj.

Gábor *Márkus*

Lingvotendaro apud Balatono

Nova iniciato de la Vojaĝoficejo Express

En Hungario post la deklaro pri la uzebleco de Esperanto en turismo oni faris multe for realigi la iniciaton: la Nacia Turisma Oficejo laŭ la stimulo de Márton Lengyel eldonis plurajn esperantlingvajn informilojn por turistoj: tiaj estas ekzemple Baza Esperanto-Konversacio por turistoj kaj Vojaĝaj informoj pri Hungario ĉiujare ekde 1981. La alia grava paŝo estis la fondo de Esperanto-Sekcio en la kadro de la Vojaĝoficejo Express. Ĉi tiu Sekcio profesie okupiĝas pri la vojaĝo de esperantistoj kaj simpatiantoj al Esperanto-renkontiĝoj. Krom tiu laboro laŭdindan formon trovis la Sekcio: memstaran programon organizis esperantistoj por neesperantistoj. En pitoreska regiono de Balatono oni donis eblecon lerni Esperanton dum unu semajno.

La Esperanto-Sekcio de la Vojaĝoficejo Express duafoje organizis apud Balatono en la vilaĝo Kiliántelep internacian lernejon por baz- kaj mezlernejanoj respektive por plenaĝuloj. Laŭ la spertoj de du jaroj ni povas konstati, ke la Vojaĝoficejo trovis la konvenan vojon akiri novajn tavolojn por Esperanto. Tiuj, kiuj dum sia libera tempo volas – krom ripozi – ne nur ekkoni alilandon, sed ankaŭ lerni, tiuj homoj trovis tre alloga la lernejon apud Balatono. Ja Balatono estas ĝenerale konata kaj ŝatata. Krom ripozi, oni povas ekskursi al belegaj partoj de Balatono, kiel faris la partoprenantoj de la lernejo ankaŭ ĉi-jare. Antaŭtagmeze ripozi kaj posttagmeze lerni – tio estis la slogano en Kiliántelep. Dum du jaroj ĉ. 230 personoj konatiĝis kun Esperanto aŭ pliperfektiĝis sian scion pri Esperanto dum po kvar lernohoroj tage. Por ke oni povu lerni en kiel eble plej homogenaj grupoj, estis establitaj lernogrupoj por bazlernejanoj kaj plenaĝuloj, kaj ene de tiuj por komencantoj kaj progresantoj. En unu grupo averaĝe 18 lernantojn ses instruistoj instruis – la plimulto de ili laŭ la Ĉe-metodo. Post la lernado oni povis uzi la lernitan lingvoscion dum la libera tempo, ja la lernejo estis internacia. Ĝis nun ĝin partoprenis bulgaroj, GDR-anoj, poloj kaj hungaroj. Ekskursoj okazis al la perlo de Balatono, al la duoninsulo Tihany, de kies altplataĵo oni povis ĝui belan panoramon.

La alia ekskursa celo estis Balatonfüred, kies famon donas la kuracakvoj kaj kormalsanulejoj. La tria vizitita loko estis la vilaĝo Badacsony, kie oni povis konvinkiĝi pri la aromo, gusto kaj forto de la hungaraj vinoj kulturataj sur la vulkana monteto.

Uzante la ĝis nunajn spertojn la instruistoj decidis prilabori specialan instrumaterialon por la kurso – per la financa helpo de la Esperanto-Sekcio de Express – por ke en la estonto eĉ pli efike okazu la instruado.

Oszkár *Princz*

Dinnyés, la kantoposedanto

„Nun alportu floron,
ne nur floron, sed konsolon! ”

Ĉu eblas esperantisti jam nekonante la lingvon? Ĉu ekzistas sinteno karakterize esperantista eĉ sen la uzo de la lingvo? Tiuj pensoj kirliĝis en mia kapo, kiam mi vidis la unuan fojon tiun kvardekjarulon, iom diketan, tamen vervavortan novepokan trobadoron, kies hungarlingva granda disko ĵus aperis. Li nepre apartenas al la plej bonaj hungaraj kantistoj – verdire ĉe la difino de la artobranĉo, praktikata de li, mi hezitis iom. Iusence li estas unika fenomeno, kaj tamen karakteriza de iu epoko, de la sesdekaj, sepdekaj jaroj de Hungario. Li diferencas disde ĉiuj aliaj kantistoj: li ne hontas eĉ piedmarŝi por kanti en kulturdomo vilaĝa ie malantaŭ la dorso de Dio, li portas sian gitaron ŝvitante, li petveturas, li libere kantas siajn proprajn pensojn – ja li mem estas la komponisto kaj la poeto de siaj kantoj. Tamen li muzikigas ankaŭ la poemojn de famaj poetoj. Li estas idolo por sufiĉe larĝa tavolo de la junularo, li estas heroo eĉ de iuj skandaloj. Se mi devas difini lian arton kaj lian personecon, mi povas diri nur unusolan vorton: Dinnyés (dinjnjeŝ).

Nove-reprove

Li trinkas limonadon kaj parolas: „En la mezepoko la trobadoroj entreprenis informi pri la aktualaĵoj kaj okazintaĵoj, ili kantis historiojn el la limfortikaĵa vivo kaj bataloj kun la turkoj. Intertempe la mondo ŝanĝiĝis iomege:



József Dinnyés

preskaŭ tuj informas nin la amaskomunikiloj, se io okazas en la transa hemisfero de la mondo. Tamen io mankas el tiu maŝineska informado: la homeco, la kora varmo – la aktuala animstato de la ethomoj.”

József Dinnyés disportas ne informojn, sed mesaĝojn. Kaj li estas unu el ni.

Li foriris el sia hejmo, dirante, ke li ne scias kiam okazos lia reveno. Li promesis reveni nur, se li enuos aŭ ne scios kion fari. Li devenas el Szeged, nuntempe li loĝas en Budapeŝto – li havis kion fari.

Jen, denove liaj vortoj: „Ekde januaro de 1967 mi vagadas tra Hungario. Mia unua memstara programo „Kanto sur la asfalto” okazis en la ĵurnalista klubo de Szeged. Tie mi kantis kaj gitarludis kun la ensemblo „Anĝeloj” (Angyalok). La unua provinca koncerto estis en la urbo Kecskemét. La unua turneo komenciĝis eble la kvaran aŭ la kvinan de januaro kaj finiĝis ĉirkaŭ la 25-30-a de marto. Dume mi vagis de unu landlimo al la alia: mi estis ĉie. Mi havis konaton en Kecskemét, kiu donis al mi la adreson de sia konato en Székesfehérvár. Tie mi ricevis adreson en Győr. Kaj tie la sekvan.

Jes, mi havis unusolan gitaron, mi ĉizis streketon sur ĝi post ĉiu koncerto. Ĝi estis jam plenĉizita, ne plu estis libera loko sur ĝi, tiam mi lasis ĝin ie en Siófok kiel pagon por unumonata loĝado – ĉar monon mi ne havis. Petveturante mi atingis miajn koncertejojn – kaj dume mi renkontis vagabondojn abunde. Dum la pasintaj preskaŭ dudek jaroj mi priatentis la sorton de iuj el ili: du freneziĝis, iu en Svedujo estas arestita, iuj forlasis la landon. Mi havas spertojn pri la rezultoj de la vagabondado sencela. Mi havis celon, kaj nun mi estas ĉi tie lernanta Esperanton. Ĉu ne strange – fine Esperanton? ”

Ni fariĝu amikoj

Dinnyés rakontas, rakontas. Mi ekscias, ke li estas – same kiel plimulto de ni ĉiuj – miksaĵo de diversaj popolfiloj. Li denombras inter la patrinaj prauloj polojn, slovakojn, rumanojn, sikulojn. Ankaŭ la patra linio havas ne malpli.

„Mi estas laŭ la gepatra lingvo – hungaro, mia ŝtataneco ligas min al la Hungara Popolrespubliko. Ĉio ligas min al ĝi: la historio, la arto kaj ĉiuj miaj amoj. La amikoj kaj malamikoj ĉi tie edukis min homo. La biologio ĉi tie sorĉis min plenkreskulo.”

Foliumante la paĝojn de iu malnova hungara gazeto (septembro 1975 Látóhatár) ni povas legi liajn tiamajn planojn en kvin punktoj. Inter ili jen: „Mi volas ellerni Esperanton aŭ iun alian lingvon, kiun parolas multaj homoj. Mi planas malfermiĝi al la mondo."

Li memoras: „Mia patrino estis kunlaboranto de ĝuste tiu Biblioteko Somogyi, kie en la sesdekaj jaroj fondiĝis la Esperanto-Muzeo.

Mia pli juna fratino post la maturiĝa ekzameno eklaboris en G.D.R. por ellerni la germanan krom la meznivele sciata angla. Fine ŝi, bone regante du lingvojn, registriĝis facile en la Gastigindustria Altlernejo. Tio estis ŝia vojserĉado al la mondo.

Mi eniris foje, komence de la sepdekaj jaroj, la Esperanto-Asociejon. Mi havis la intencon lerni Esperanton, tamen vane mi diradis, ke mi ne scias ankoraŭ, mi volas lerni Esperanton, iuj maljunuloj persiste alparoladis min Esperante. Mi strebis kontraŭpersisti, ke mi tamen volas lerni la lingvon – sed ĉio vane. Fine ili ekhungaris, komunikante, ke tiumomente ne ekzistas ia kurso. Tiu grandioza evento puŝis min for de la lingvo ĉirkaŭ por dek jaroj.

Lastatempe entuziasmaj gejunuloj serĉis min – kaj mi eklernis la lingvon. Mi ricevis ankaŭ la unuan dekon da esperantigitaj kantoj.

En la Festivalo Junulara kaj Studenta en Moskvo mi jam kantis Esperante. Septembre pretos duonhora, oktobre tuthora programo Esperante. Mi havas la ambicion viziti multe da Esperanto-kluboj kaj eventoj, se estos eble eĉ ne nur en Hungario. En miaj hungarlingvaj koncertoj mi volas kanti iom ankaŭ Esperante. Krome mi havas emon fari eksterordinarajn Esperanto-lecionojn en la lernejoj, kie la etuloj lernas ĝuste tiun „nian orfan idiomon". Aŭtune pretos kasedo kaj baldaŭ eldoniĝos ankaŭ mia kantlibreto. Kial rakonti plu – mi havas tutan planaron: muzikigo de la plej elstaraj Esperanto-poemoj okaze de la centjariĝo, trobadori per, por kaj en Esperanto, eduki novan generacion, kiu daŭrigos la vojon komencitan."

Mi rigardas lin komence dubeme, poste jam certiĝante, ke li pensas ĉion ĉi tre serioze. Li serĉas amikajn manojn por tiu ĉi fortostreĉo – kaj dume mi certas, ke aro da amikaj manoj helpos lin, ke li povu kanti ĉiam

Hispane kunfirmante – Dinnyés kun studentoj el Ĉilio

protestante: „Ni vivante restu fratoj, / kaj mortintaj nekonatoj / ni fariĝu neniam! "

„Se falante: restarante"

Mi lasas lin rakonti plu: „La epoko, kiun ni vivas, ne permesas multe da tempo por la gejunuloj, ke ili detale studu la vivon de la antaŭuloj. La modelo de la rapidaj sukceskarieroj obsedas la junajn geknabojn. Ankaŭ la lernejoj ne prezentas la tipon de homeco kaj tiel ne multe helpas la evoluon de la personeco.

Kiuj estis miaj modeloj? Laŭ la interlecionaj rakontoj de mia maljuna fizikoinstruisto por mi fariĝis modelo Ányos Jedlik, sennoma eltrovanto de la dinamo. Post du jaroj duelis en mia animo jam George Harrison kun Bryen Jones. Do, la modeco konkeris min. Kiam mi komencis verki jam kantojn kaj ankaŭ la gazetoj okupiĝis pri mi, tiam abrupte fariĝis por mi klare, ke ekzistas nur unusola pop-muziko. Iu ĵurnalo en Szeged skribis pri mi, ke miaj kantoj – laŭstile kaj laŭ aktualeco – memorigas pri Bulat

Ie malantaŭ la dorso de Dio



Tie en la tedaj minutoj (ekzistis plurcentmiloj da tiaj) mi legis. Mi legis multe. Ĉion, kion mi ne legis en la antaŭaj 19 jaroj: Thomas Mann, Dostojevskij, Feuchtwangler, Ĉehov, Thomas Wolf. La kunuloj rigardis min iom stulta, sed tie mi legis la verkojn de Marx kaj Lukács. Ankaŭ la amo tie kaptis min.

Post la elarmeiĝo mi edziĝis. La edzino estas ceramikistino kaj ne lastavice patrino de miaj du filinoj Orsolya kaj Eszter. Ankaŭ mia edzino devenas el Szeged."

Kaj li eksilentas. Kvankam mi scias, ke aliulo en lia loko nepre daŭrigus la paroladon pri la distingoj kaj rekonoj, kiujn li havas. Pro la ĝisnuna elstara laboro li ricevis en 1984 la ordenon „Pro pacagado" de la Hungara Packonsilantaro. Sed li silentas.

Okuĝava kaj Kurt Weil. Mi eĉ ne sciis, kiuj ili estas. Poste mi konsultis diversajn fontojn kaj vere: ankaŭ ili kantis pri la homoj de la stratoj. Jam en 1967 oni nomis min tutlande Bob Dinnyés, analoge al la nomo de Bob Dylan. Nu, ek al la kantoj de Bob Dylan. Mi tradukis lin kaj Donovan, Pete Seeger. Mi buŝharmonikis, entuziasmigis, petveturadis kaj luktis por la vero de la homoj surstrataj. Che Guevara estis jam la plejalto por mi. Tiam mi soldatiĝis por du jaroj.

Li heziteme turnadas la cigaredstumpon. Ankaŭ mi kunsilentas, mi sentas, ke nun li revenas – almenaŭ anime – al la iama urbo, al la hejmo. Kaj al la mondo.

Ni esperantistoj, helpu lin por ke li havu fortojn helpi nin. Por ke li fariĝu vere unu el ni, kaj elstara inter kaj por ni.

Imre *Szabó*

KANTOJ DE JÓZSEF DINNYÉS

NUN ALPORTU FLORON!

(Hozz egy szál virágot!)

Poemo-muziko: József Dinnyés
Traduko: Imre Szabó



Sed la ombroj heroaj ne ripozas,
nin dividas, inter ni vive pozas.
Kaj alportos ĉi-figuroj
nur futuron de torturoj
kaj minacon por la viv'.
Nun alportu floron,
ne nur floron, sed konsolon!

La pasinton konfese ni alfrontu,
la pacigajn suferojn ni ne hontu!
Ni vivante restu fratoj,
kaj mortintaj nekonatoj
ni fariĝu neniam!
Nun alportu floron,
ne nur floron, sed konsolon! NUN!

MIAJN SONGOJN!!!

(Álmom mások...)

Poemo: Domokos Szilágyi
Muziko: József Dinnyés
Traduko: Imre Szabó



Trobadori, trobadori, trobadori – Dinnyés kantas

REGIONOJ DE HUNGARIO

Departemento Pest

Jen, ni trarigardis la departementojn de Hungario, kaj je la fino de tiu serio ni alvenis al la lasta – tamen centre situanta – regiono, t.e. departemento Peŝt. Ĝia geografia situo ne estas tute centra, tamen konsiderante, ke ankaŭ la ĉefurbo situas sur ĝia teritorio, ni rajtas rigardi ĝin „mezo" de la lando. Ja Budapeŝto, la ĉefurbo mem havas multe pli grandan signifon kaj el kultura, kaj el ekonomia vidpunkto, ol ĉiuj aliaj teritorioj de la lando, konsekvence ne estus ĝuste, se ni traktadus la priskribon de Budapeŝto en la kadro de Departemento Peŝt. Do, en tiu ĉi artikolo ni priskribas nur la departementon, sed ne Budapeŝton, kiu ja el administra vidpunkto ne apartenas al Departemento Peŝt.

Unue ni menciu la urbon *Cegléd* (cegleed), proksime al la orienta rando de la departemento. Ĝi havas ĉ. 40 000 loĝantojn kaj estas unu el la karakterizaj malnovaj urboj de la Hungara Ebenaĵo. El fremdultrafika vidpunkto Cegléd estas konsiderebla nur kiel transit-loko, tamen tra Cegléd kontaktiĝas la ĉefurbo kun la orientajsudaj landopartoj kaj tuŝas ĝin ankaŭ konsiderinda parto de la turista trafiko, direktiĝanta de okcidento al oriento.

Ĉi tiu regiono iam estis landvojo dum la epoko de la popolmigradoj kaj el tiu tempo ĝis nun restis multaj memoraĵoj. La unua ĉarta mencio devenas el 1290. Poste, dum la turka regado la urbo suferis multe, tamen ĝi sukcesis eviti la definitivan detruiĝon.

Cegléd kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas karakterize agrara kaj fruktoprodukta regiono. Ĉi tie estas la centro de la ebenaĵa vinprodukta regiono, sed krom tio ekzistas ankaŭ malpeza industrio. En la Muzeo Kossuth ni povas rigardi multajn arkeologiajn, folklorajn kaj urbhistoriajn memoraĵojn. Krome videblas tie multnombraj dokumentoj el la liberbatalo de 1848/49, kaj pluraj personaj uz-objektoj de Lajos Kossuth, grava figuro de la hungara historio. Arkitektura kuriozaĵo estas la granda, klasikstila preĝejo Kalvinana.

Nagykőrös (nadjkeereŝ) laŭ sia loĝantaro (28 000) estas iom mapli granda urbo, ol Cegléd. La nomon de la urbo faris konata ĝiaj kulturhistoriaj memoraĵoj kaj la plurcentjaraj, famiĝintaj lernejoj. Nuntempe konsiderinda estas ĝia frukt- kaj legomeksporto. El la agraruzinoj la konservaĵfabriko akiris renomon kaj ĝi fariĝis la kvalite unua tia fabriko de Hungario. Hodiaŭ Nagykőrös havas plurajn industriajn uzinojn, la plimulto de ĝia loĝantaro laboras en tiuj uzinoj.

El inter la kuriozaĵoj de la urbo elstaras la origine gotikstila Kalvinana preĝejo, kiu akiris sian nunan fizionomion en la dekoka jarcento.

La urbo havas subĉielan scenejon, Junularan Parkon kaj konstruaĵon por la Belarta Rondo. La banejon de la urbo nutras tri profunde boritaj putoj per 32-grada termoakvo.

Katolika katedralo en Vác



Gödöllő (gedelle) estas eta urbo, ĉirkaŭata de belaj ekskursejoj. Ĝia landsignifa artmemoraĵo estas la iama Kastelo Grassalkovich, kiu poste fariĝis reĝa somerumejo. Nuntempe ĝi funkcias kiel sociala hejmo.

La urbo, montranta agrablan, varian urbobildon, krome havas plurajn interesajn arkitekturajn konstruaĵojn, kiuj meritas la atenton de la turistoj.

Gödöllő estas grava centro de la agrara scienco. Ĉi tie funkcias la Agrarscienca Universitato, kie oni instruas kaj edukas ankaŭ agrarajn maŝininĝenierojn. Krom la universitato ni trovas tie Etbestbredadan Esplorinstituton kaj Arbarkulturan Sciencan Instituton, kun eksperimenta kolonio.

La vilaĝo *Ócsa* (ooĉa) havas landfaman artmemoraĵon. Ĝia Kalvinana preĝejo devenas el la dektria jarcento. Ĝi estas romanstila baziliko kun belaj lignoskulptaĵoj. La 50-hektaran marĉarbaron pro ĝia valora faŭno oni alligis al la naturprotekta teritorio, kiu situas inter la vilaĝoj Ócsa kaj Dabaŝ.

Ráckeve estas la plej multhoma vilaĝo de la insulo Csepel (ĉepel), situanta sude de Budapeŝto. La vilaĝon fondis serboj en 1440, rifuĝintaj de antaŭ la turka invado el la suda parto de Hungario.

Landskale konata artmemoraĵo estas en Ráckeve la barokstila kastelo de Jenő Savoyai, konstruita en 1702. Simile valora artmemoraĵo estas la malfru-gotikstila grekortodoksa preĝejo el la dektria jarcento.

Ráckeve estas la plej grava centro de la Danuba fiŝhokista kaj akvosporta vivo. Diversaj ripozdomoj, varmakva banejo kaj restoracioj atendas la ripozemulojn.

Százhalombatta (sazhalombatta), situanta sur la Transdanubia teritorio de la departemento, apud Danubo, origine estis eta vilaĝo. Ĝi ricevis sian nomon pri tiuj montetoj, kiuj videblas ĉirkaŭ la vilaĝo, kiel arkaikaj restaĵoj el la epoko de la popolmigrado, kaj supozeble ili estis enterigaj lokoj post la tie okazintaj gravaj bataloj.

En la limo de la urbo konstruiĝis unu el la plej grandaj termocentraloj de Hungario. Ĝi strikte ligiĝas al la Naftorafinada uzino, kiu prilaboras sovetan nafton. Sekve la vilaĝo hodiaŭ estas vigla industria urbo.

Ĉe la okcidenta rando de la departemento situas juna urbo: *Érd*. En la grandtrafika urbeto funkcias hotelo, restoracio, banejo kaj kampadejo por 500 personoj.



Preĝejo en Fót

Krom la diversaj valoraj artmemoraĵoj, devenintaj el la mezepoko, speciale interesa kuriozaĵo estas la turka minareto, memoriganta pri la longaj jardekoj de la turka regado.

Zsámbék (ĵambeek) estas pramalnova vilaĝo, kies historio komenciĝis en la dekdua jarcento. La gotikstila baziliko de la vilaĝo, deveninta el la dektria jarcento, estas landfama artmemoraĵo. Tertremo okazinta en 1763 grave difektis la konstruaĵon. De tiu tempo ĝi staras ruinigita.

Ĉe la dekstra bordo de Danubo viciĝas la fremdultrafike plej frekventataj urboj de la departemento. Veturante norden ni trovas unue la urbon *Szentendre* (sentendre), havanta 16 000 loĝantojn. La urbeto estas riĉa je artmemoraĵoj. Ĝia ĉirkaŭaĵo precipe taŭgas por akvaj sportoj.

La historio de la urbo komenciĝis antaŭ la popolmigrado. Ĝia nomo aperis unuafoje en latinlingva diplomo en la dekdua jarcento. La tatara invado detruis la urbon, poste en la fino de la dekkvara jarcento ĝi komencis reviviĝi, kiam multnombra ser-

ba loĝantaro rifuĝis tien de antaŭ la turka invado. Kvankam la turka regado interrompis la evoluon de la urbo, tamen la ĉi tie ekloĝinta serba loĝantaro ankaŭ poste restis en la ĉirkaŭaĵo. Dum la dekoka jarcento formiĝis vigla komercista vivo kun serbaj popolkutimoj. Ekfunkciis pravoslava episkopa rezidejo, kun naŭ paroĥoj.

Szentendre intertempe evoluis grava centro de la vinproduktado. Post la dua mondmilito en la urbo ekfunkciis ankaŭ industriaj uzinoj.

Por la turistoj Szentendre estas ŝatata celo: multnombraj artmemoraĵoj, konstantaj ekspozicioj atendas la gastojn. La ĉefplaco de la urbo ĉiusomere estas scenejo de riĉaj kulturaj aranĝaĵoj.

Pluirante nordokcidenten ni trovas la plej frekventatan urbeton de Danubkurbo: *Visegrád* (viŝegraad). Pro la rava ĉirkaŭaĵo miloj da turistoj vizitadas Visegrád-on, kie abundas pitoreskaj naturbelaĵoj. La urbeto formiĝis jam en jaro 1000, dum la regado de la unua hungara reĝo. La burgo, konstruita sur la supro de la Visegrád-a monto, fariĝis rezidejo de pluraj hungaraj reĝoj. En la mezepoko ĝi estis unu el la plej belaj reĝaj palacoj de Eŭropo.

Kaj ni finu la departementan promenadon ĉe la urbo *Vác,* kiu situas apud la maldekstra bordo de Danubo kaj havas ĉ. 35 000 loĝantojn. Ĝi konstruiĝis ĉe tiu punkto de Danubo, kie la riverego turnas sian fluadon al suda direkto kaj atingas ebenan teritorion.

Vác estas somerum-karaktera urbo, ĉiam pli industriiĝinta. Nuntempe ĝi havas tekstilindustrian bazon, krome ŝipfabrikon kaj la solan film- kaj fotopaperfabrikon de Hungario.

Tamen ĝia plej signifa industria uzino estas la Danuba Cement- kaj Kalkuzino.

Interesa arkitektura memoraĵo de Vác estas la romkatolika episkopa katedralo, konstruita en la dekoka jarcento. En la limo de la urbo troviĝas romi-epoka fortikaĵo el la kvara jarcento, konstruigita de imperiestro Valentinianus.

Departemento Peŝt havas ankaŭ tre riĉan kaj varian esperantistan vivon: HEA havas en tiu ĉi departemento 14 lokajn grupojn kun entute 605 membroj.

István *László*



Százhalombatta estas industria urbo

La Gimnazio Kossuth en Cegléd. (Fotoj de Z. Fejér)



Originala Poezio

Aldo de' Giorgi

Koŝmaro

La cigareda fum' volutas
svaga kaj grizarĝenta.
Identa,
kiel miraĝo nepalpebla
estas ĉi rememoro.
La horo
la padojn perditajn ne spuras,
ŝvebas torpora narkoto.
Nur koto,
nur ŝlima kaj stinka laguno
la paŝojn bar-antaŭas,
sed laŭas
ilin neforigebla strebo
daŭre rehantanta.
Kaj lanta
falas eksterme la konscio,
pri kio fat' sentencis.
Atencis
la iluzioj ĉian eblon
ĉimondan, kaj racion.
Nenion
postlasis amo putriĝinta.
De ŝia lasta bleko
la eĥo
vunde sarkasma kaj finpunkta
repikas hist-enire.
Delire
regurdas la admon' drakona:
Neniam plu! Nek tamen!
Nur
Amen!

Julio Varga

Mi ŝatus iĝi

por la falanta: spong' elasta, mola,
por pesimisto: flago verda, ora,
balzam', bandaĝ': por la vundito,
futur': por la konservativo,
por la amare lamentant': mielo,
por la sendorma infanet': fabelo,
por la ĝojanto: Aliulo,
la ĝojon dividanto per gratulo,
por la senhejma: varma ĉambro eta,
por malsatanto: blanka pano preta,
kunul': por rigardanto la Ĉielon,
direkta pad': por prodiganto, celon
montranta ale al la hejma vojo,
por subpremito: fort', aplomba volo,
levanta lin eĉ el profundo, polvo,
por ĉefo, potencul': humilo,
por la forfet' de maskoj: ilo,
por hezitanto: firma, certa roko,
garantiaĵo ora: al la vorto,
por olda hom': apogbastono, forto,
finfine por mortant' konsol', espero:
„la fin' – komenco"; tiu ĉi la vero.

Imre Szabó

La ebria rivero

Mi ruligis la vortojn
mi ruliĝis en la vortoj
ebriis la bordoj de la ebria rivero
sin svingis la gracitaliaj betuloj
ni plantis ilian blankon
por heroldi nin
nian amon, blankan kolombon
kiu povas nur flugi
mortas se surteriĝas

la ebria rivero multobligas ilin
branĉumate

Aurél Ponori Thewrewk

Omar'

Neniu fetu sur lin ŝtonon
kaj serĉu kulpon en li:
Omar' malriĉa ege ŝatis
la pipon plenan de l' opi'.

Kiel mulo li trenis sakojn
kiujn surŝarĝis lin Harun',
por ke alvenu nokt' kolora,
por ke alvenu rava fum'.

Omar' en fundoj de l' tavernoj
bruligis pipon kun l' opi'.
Neniu fetu sur lin ŝtonon
kaj serĉu kulpon ne en li.

Sur lin ebrio rava flugis
kiel vual' de l' bajader'.
Li sentis: venas la ĉielo
kaj malaperas la mizer',

brilegas en la kolorplena
pompa pejzaĝo la florar',
flugete post regaloj venas
hurioj sorĉaj al Omar'.

La tera tago iĝis sonĝo,
ĉiela nokto je real'.
Multa kaj peza la trenado,
malmulta estis la regal'.

Tiel li mortis. Malfermiĝis
la bonkonata horizont'.
Ekkriis ja Omar' vespere:
ĉu estas pipo en ĉi mond'?

István Nemere

LA TREZORO

5. Laŭra en danĝero

– Sensacie! – eksaltis la gejunuloj. Laŭra kaptis tuj la kolon de onklino Gracia kaj kisadis ŝin. La maljunulinon tio eble eĉ plie mirigis, ol la ekscita historio de la „infanoj". Sed ŝi malhavis la tempon pripensi ĉion ĉi – fortan premon ŝi sentis surŝultre. Gracia eĉ por momenteto ne dubis: estis tio vira mano. Ŝi turnis sin. Petro profunde rigardis en ŝiajn okulojn:

– Onklino Gracia...

– Bone, bone, vi ankoraŭ ne estu dankemaj, sed pacemaj – ŝi, sentanta la grandan signifon de la momento, malrapide sidiĝis sur la kanapo, la dorson apogis al la muro, kaj ŝajnigis denove observi siajn notaĵojn. La gejunuloj tion jam ne eltenis, ekatakis ŝin:

– Onklino, diru jam!

– Ni aŭdu finfine la grandiozan malkovron!

Nun ŝi faris tiel, kvazaŭ pripensus, ĉu tion fari aŭ ne, ja ŝi havas tiom da aliaj laboroj... Fine kun ruzeta rideto ŝi demetis la notaĵojn kaj prenis la paperon, kiun Laŭra ricevis en la notaria oficejo:

– La sekreto kaŝas sin en la komencaj literoj de la frazoj, miaj etaj stultuloj. Kial vi ne malkovris tion jam pli frue...? Do, ni observu la tekston. Mi legas nur la unuajn vortojn: **Mi... Donos... Se... En... Ambaŭ... Patro.** Do, entute: MDSEAP.

– Tio estas nur sensenca aro de literoj – diris Petro iom seniluziiĝinte.

– Tio nenion signifas – rimarkis ankaŭ Laŭra. La gejunuloj rigardis unu al la alia, ili ambaŭ pensis same: la onklino jen, maljuniĝis, ŝia cerbo laboras jam ne tiel, kiel iam, jes ja.

– Mi ne estas tro maljuna kaj stulta, kiel vi opinias – Gracia bonege legis laŭ iliaj mienoj. – Mi scias, kion mi parolas. Laŭra, aŭskultu memorojn el mia infanaĝo: tiam mi ofte somerumis kun la gepatroj en apudrivera vilaĝeto. Ĝi nomiĝis Monto de Sankta Erasmo, kaj ĝi estis – se oni veturis el la ĉefurbo – antaŭ la urbo Paronne. Do, nun aŭskultu la sencon de literoj: MDSEAP – Monto de Sankta Erasmo antaŭ Paronne. Ĉio klaras!

– Vere, ĉio klaras! – nun Petro saltis al Gracia kaj kisis ŝian vizaĝon. La onklino feliĉe enspiris la aeron kaj brilokule daŭrigis:

– Sankta Erasmo situas en bela regiono, kaj eĉ ne estas tro malproksime de tie ĉi, eble nur je cent kilometroj.

– Kiam ni ekveturos? – demandis Laŭra.

– Tuj! – stariĝis ŝia edzo.

Sed la onklino montris al la fenestro.

– Ĉu vi vidas...? Jam mallumiĝas. Ĉihore ne indas ekveturi; ni estus alvenontaj nokte. Prefere... morgaŭ? !

– Mia ĉefo ne liberigos min – malgajis la junulino.

– Morgaŭ estos vendredo. Posttagmeze mi denove luos aŭton, kaj ni ekveturos. Eĉ se ĉiu nia ŝparita mono elĉerpiĝos! – promesis Petro.

– Se jam temas pri mono, ankaŭ mi devas pagi parton de la kostoj – diris la onklino kaj elprenis sian monsaketon.

* * *

Sekvatage posttagmeze Petro nenion konjektante kondukis la luitan aŭton al la oficejo, kie Laŭra laboris. Tie oni ĝuste finis la laboron. La viro pacience atendis – sed Laŭra ne alvenis. Post dudek minutoj li eniris la domon, suprenveturis per la lifto kaj... li eksciis, ke Laŭra antaŭ horo foriris el la oficejo, ĉar desube iu telefone komunikis al ŝi: sube atendas ŝin la edzo.

Petro nenion komprenis. Ja hodiaŭ li ankoraŭ ne estis ĉi tie, do kiu viro serĉis Laŭran? Kaj kie malaperis la edzino?

Kun malbonomena animagordo li veturis hejmen; li esperis, ke Laŭra jam pli frue iris al la onklino. Sed se tiel okazis – do kial ŝi ne telefonis ? Li estis tiel nervoza, ke preskaŭ karambolis kun iu piediranto.

* * *

– Verŝajne okazis al li io malagrabla – diris unu el la viroj en la aŭto, kiu postsekvis Petron.

– Eble li rimarkis, ke ni veturas post li – opiniis lia kunulo.

Petro haltigis la aŭton antaŭ la domo de la onklino kaj kuregis sur la ŝtuparon. Dume, antaŭ la domo renkontiĝis kvar viroj:

– Ĉu vi observas la maljunulinon aŭ la junulinon? – demandis la viro kun elstarantaj oreloj kaj densaj brovoj. Respondis al li la maldika, lenughava juna viro:

– Ni la maljunulinon. Sed al la junulino verŝajne okazis io malagrabla, antaŭ minuto sciigis tion la ĉefo.

* * *

– Laŭra malaperis! – Petro falis tra la pordo en la loĝejon. La ruĝgrizaj haretoj de Gracia maltrankvile ekmoviĝis:

– Kion signifaŝ, ke... ke ŝi malaperis?

Sed ĉimomente eksonoris la telefono. Petro kiel tigro ĵetis sin al la aparato. „Se tio estas Laŭra, do mi kolere diros al ŝi, ke..." Sed li aŭdis malagrablan, fortan voĉon de viro, kiu ne toleris kontraŭdiron:

– He, vi! Aŭskultu min! Via edzino estas en niaj manoj. Ne sciigu al la polico, ĉar tiuokaze vi ne rehavos ŝin vivan! Atendu ĉetelefone, pli poste ni denove telefonos – kaj klaketo komprenigis al la senespera edzo, ke finiĝis la mallonga „interparolo".

* * *

– Oni forkondukis Laŭran! – diris Petro, jam almenaŭ la centan fojon. Estis malfruvespere, kaj vane pasis la horoj – nenio okazis. La sciigo konsternis ankaŭ onklinon Gracia; la maljunulino vere nur nun komencis konjekti, kontraŭ kiaj homoj ili devas batali. Ŝi kaj Petro kune sidis en la loĝejo kaj atendis la sonoron de la telefono.

Sed la aparato ankoraŭ silentis.

* * *

Laŭra sidis sur seĝo, en preskaŭ malplena ĉambro. Oni ligis al la seĝo ŝiajn manojn kaj piedojn. Estis malhele kaj silente. La virino malfacile spiris. Ŝi volis krii, sed ŝi sciis: nur superflue ŝi perdigus la fortojn. Depost kiam „ili" ŝin kaptis, neniu alparolis Laŭran.

Iu telefonis al la oficejo, kaj diris, ke li estas la pordisto. „Sinjorino, via edzo alvenis kaj atendas vin sube, en la garaĝo." Kaj Laŭra nenion timante subeniris. Ĉe la enirejo staris aŭtobuseto, iu metis la manon al ŝia buŝo, fortaj virbrakoj kaptis ŝin... kaj la aŭtobuseto rapidege forveturis el la garaĝo al la stratoj...

Ŝi nun aŭdis bruon. Oni malfermis la pordon de la ĉambro, ŝi vidis la siluetojn de du viroj. Iliaj vizaĝoj restis en la mallumo.

– Nu, etulino! Ĉu vi ne enuas? Ĉar se jes, do ni povus iom amuzi vin... Ni alportos liton, ha-ha-ha! – la bandito mallerte provis brakumi Laŭran.

– Ne tuŝu min! – kriis la virino.

– Ho-ho, kiel koleras la katino! Eĉ vi eble estus skrapanta min, se mi deprenus la ŝnurojn...

– Deprenu kaj vi vidos!

– Ne kriu, ĉar... – la viro levis la manon por bati. Sed lia kunulo forpuŝis lin:

– Foriru, stultulo! Por tio vi havos tempon poste. Alportu la telefonon – la alia viro en la duonlumo puŝadis la telefonbutonojn. – Alo, ĉu estas vi? Mi esperas, ke vi ne sciigis la aferon al la polico, ĉu? Bone, Eble vi volas konversacii kun la edzino? – kaj li subite ŝovis la aŭdilon al la kapo de Laŭra.

– Ĉu Petro...?

– Jes, karega, jen mi!

– Liberigu min, Petro!

– Mi ĉion faros por vi, amata.

La bandito forprenis la aŭdilon, kaj denove li parolis:

– Do vi konvinkiĝis pri tio, ke via edzino vivas. Se vi volas ŝin denove havi, transdonu al ni la testamenton.

– Tio signifas... la trezoron.

– Jes ja. La trezoro ne apartenas al vi. Via bopatro, tiu porko, forrabis ĝin de ni.

– Mi komprenas – respondis Petro. – Kiam kaj kie estos la interŝanĝo?

– Pri kia interŝanĝo vi parolas? Vi donos al ni la dokumenton, poste, se ni konvinkiĝos, ke la trezoro vere troviĝas tie, ni liberigos vian edzinon.

– Mi ne konsentas. Interŝanĝe por la testamento mi tuj volas ekhavi la edzinon.

– Ĉifoje ne vi diktas la kondiĉojn, junulaĉo! Atentu bone: tuj veturu al la placo Marcus, atendu ĉe la fontano. Havu enmane la paperon. Miaj homoj alparolos vin el iu aŭto, vi donos ĝin al ili kaj fino! Poste iru hejmen kaj atendu la edzinon.

– Mi komprenas – respondis Petro rezigne. – Tuj mi ekveturos al tiu placo. *(Daŭrigota)*

Esperantlingvaj radioprogramoj el Hungario

Esperanto-elsendoj de 3-a programo de Hungara Radio estas aŭskulteblaj dimenĉe, je la 13-a horo kaj 05 minutoj. La kvinminutaj elsendoj enhavas turismajn kaj movadajn informojn. Ili estas kapteblaj nur pere de modulitaj frekvencoj (ultrakurtonde) laŭ la megahercoj: 67,04; 67,97; 68,24; 68,36; 68,48; 68,72; 69,38; 70,10; 70,43; 70,64 kaj 72,08. Aŭdebla en Hungario kaj en la apudlimaj regionoj de la najbaraj landoj. Adreso de la redakcio: Radio Pécs, Esperanto, Pécs, Pf. 200. Hungarujo, H-7601.

Aúskultu ankaú Vi!

PANORAMO



Triobla festo

La 20-a de aŭgusto estas triobla festo en Hungario. En tiu ĉi tago oni primemoras la unuan hungaran reĝon, Sanktan Stefanon; tiu ĉi tago estas la festo de la „nova pano", kaj antaŭ 36 jaroj en tiu ĉi tago estis proklamita la konstitucio de la Hungara Popolrespubliko.

La 20-a de aŭgusto estas tradicie popola festo – ĉie en la lando oni organizas spektaklajn programojn por amasa publiko. Unu el la ĉefaj programoj estas la akva kaj aera parado en Budapeŝto sur kaj s u per Danuo

Denove en Budapeŝto

En aŭgusto denove gastis en Budapeŝto la mondfama muzikisto Leonard Bernstein. Ĉifoje li venis al la hungara ĉefurbo por fari koncerton en la vico de la packoncertoj, kiujn li jam prezentis en pluraj ĉefurboj.

La Budapeŝta koncerto okazis en la Sporthalo Budapest, antaŭ ĉ. 8000 personoj, kaj la fama usona muzikisto ankaŭ nun havis grandan sukceson antaŭ la publiko de la hungara ĉefurbo.

PANORAMO



Revuo de la hungara agrikulturo

En Budapeŝto oni organizis grandan Ekspozicion de la Hungara Agrikulturo kaj Nutraĵindustrio. Kiel konate, agrikulturo kaj nutraĵindustrio havas ŝlosilan rolon en la hungara ekonomio – tial la publika prezentiĝo de tiuj branĉoj de la produktado altiris la atenton ne nur de fakuloj, sed ankaŭ tiun de la vasta publiko.

En la Ekspozicio partoprenis ankaŭ aliaj landoj, kaj tio multe helpis evoluigi la internaciajn kontaktojn de la hungara agrikulturo.



Renesanco de ĉevaloj

Kiel en multaj aliaj landoj, ankaŭ en Hungario lastatempe oni spertas populariĝon de ĉevaloj, nu, ne kiel tirbestoj, sed por rajdado. Urbanoj ĉiam pli sopiras rekontaktiĝi kun la naturo, kaj unu el la formoj de tiu rekontaktiĝo povas esti partoprenado en rajdlecionoj.

Sur nia foto oni povas vidi junajn lernantojn en la rajdlernejo de Pomáz, vilaĝo apud Budapeŝto.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

Mirindaj ombroj en la pupteatro

Somere ripozas ĉio kaj ĉiu: la homoj, la teatroj. Pro tio refreŝige venis la novaĵo: en la Hungaran Ŝtatan Pupteatron oni invitis nin – plenkreskulojn kaj infanojn – por ĝui spektaklon de ombroj. Japanaj pupistoj venis tra Rotterdamo kaj Aŭgsburgo al Budapeŝto por prezenti sian arton – cetere ili survojis al la ĉijara PIF en Zagrebo. Ni jam aŭdis pri tiu ĉi ensembleto, ja kelkaj aŭgsburgaj kongresanoj plendis pro manko de loko en la tiea teatro.

Je nia granda ĝojo – kaj surprizo – la teatro plenplenis. Scivole ni atendis la prezentadon, ja ne tre ofte ni povas ĝui tiaspecan spektaklon, eĉ ne en la nacia lingvo.

Ilona Koutny en sia enkonduko konigis la historion de la ombroludo. Ĝia patrujo estas Ĉinio, sed niaj artistoj venis el Japanujo, kaj ili estas gelernantoj de tre konata japana majstro.

Post kelkaj minutoj malfermiĝis antaŭ niaj okuloj mirinda mondo: mirindaj koloroj, mirindaj pupoj-ombroj. La geaktoroj tiel bele prononcis la fabelon pri la edziniĝo de museto, kaj tiel bele kantis, ke ĉiuj povis –„granduloj" kaj etuloj – ĝui la spektaklon. Verŝajne ne mi estas la sola, kiu la unuan fojon vidis en sia vivo koloran ombroludon, kaj eĉ ne povis ĝis nun imagi, ke tiel rave oni povas uzi tiun artospecon.

En la dua parto sekvis tre interesaj minutoj – bedaŭrinde nur kelkaj minutoj: aktorino aperis antaŭ la paravano kaj ludis kune kun la infanoj. Poste ŝi vokis kelkajn kuraĝajn etulojn, kaj ili fariĝis „geaktoroj" malantaŭ la paravano.

Estis tre agrabla surprizo, ke la 21-an de aŭgusto, do en plena somero, la spektejo estis plenplena – kaj ne nur de esperantistoj. Ĉeestis ankaŭ raportistino kaj fotisto de la hungarlingva porinfana gazeto „Pajtás", aperanta en pluraj centmiloj da ekzempleroj. Cetere la japanaj artistoj gastrolis ankaŭ en Csillebérc, en la internacia tendaro de hungaraj junpioniroj. Tiamaniere ankaŭ Esperanto estis propagandita laŭ la plej trafa maniero.

Dankon, karaj geaktoroj, pro la „kultura freŝa vento" en tiu varma tago.

Maria *Benczik*

La publiko videble ĝuis la spektaklon

Fine de la prezentado rolis ankaŭ la infanoj. (Fotoj de Z. Fejér)

Poemoj de Attila József

Kiom bone estus ne rebati

Kiam estas ni batataj grave,
kiom bone estus ne rebati.
Nek permane, nek pervorte,
lumi kun la taglumo,
ekdormiĝi kun la nokto,
voĉi per la voĉo de malkuraĝo,
sed neniam rebati.
Mi devus disputi kun miaj animoj,
kaj nun vivanta estas mi la paco.
Kristala riverakvo fluadas
en la vejnoj diamantaj.
Milda brilo la ĉemizo,
kaj paco, paco ĉie,
kvankam nur mi mem vivas per ĝi! ...
Levas min la sunradioj,
Dio kisas ĉiujn miajn vizaĝojn,
kaj grandaj, penŝarĝitaj ĉaroj ekiras el mi
al la dezerto.

(La 10-an de julio 1924.)

Diamanto

La psalmoj ĉiutempe aktualas.

Ni staras sur monto diamanta,
sed en la poŝoj estas ŝtoneroj.
Tre forgesiĝis, ke ni anĝeloj estis iam,
la blankajn flugilojn ni ŝtopis en dikajn kusenojn.
Nun indulgo-petoj soifas niajn fortojn,
kaj subgenue la ŝtonoj frotiĝis truaj,
en nia koro frostiĝis la stelo.

Jes. Jes.

Dronis la maristo-soldatoj:
mildaj pramistoj boatas al Dio.
Eĉ la tre maljunaj sidiĝas
sur la krudan bankon antaŭ la afoj,
kaj ili predikas paciencon fore
al la fiŝoj de pasemo.
Jes. Jes.

Do, ni ne kredu, amikoj,
ke ni pilkludis anstataŭ pilkoj per propraj pugnoj!
Oni devas karesi ĉion,
eĉ la hienojn, eĉ la ranojn.

Ni staras sur monto diamanta,
severa neĝo, kovru niajn kulpojn,
absolvu niajn langojn, ĉiela klaro!
Vi senlima kristalo!

(1924)

Dio

Vidis mi, Sinjoro, Viajn montojn,
kaj tiom malgrandas mi.
Mi ŝatus esti granda, simila al Vi,
por povi sidiĝi sur vian sojlon, Sinjoro.
Mi metus la koron tien,
sed kiel plaĉus al Vi mia malgranda koro?
Ĝia malforta balbutado
perdiĝus en la tondro de Viaj enormaj montoj,
kaj sub mia lito tranoktas la ĉagreno:
kial mi ne kapablas multe pli bele?
Kiel la montoj, kiel la herboj,
en ilia koro flagras belaj verdaj fajroj,
kaj la laciĝintaj skaraboj ĉiuj trovas la vojon hejmen, se vesperiĝas,
kaj Vi kun malfermitaj polmoj, en ĝisgenue lirla kvieto,
tie Vi staras ĉe ilia vojfino –
Vin mi ne ĝenas, Sinjoro,
Vi forrigardas super niaj floroj.

(Aŭtune 1925.)

Ad sidera

Vi panjo, jam senlima malproksimo,
vin jam, se mankas pano, ne ĉagrenas,
vi ne plu palas, se vespero venas
veante sangon kun malsato-timo.

Vi, panjo, jam silenta malproksimo,
vi ne alturnas nube la okulojn,
ne vidu plumbopugni la torturojn –
pro kiuj muĝas ĉi-batita sino.

La vivo eĉ panpecon ne valoras!
Tamen, mi kredas – la futuro gloras:
por pano ne plu ploros infangoriĝo,
sed povos plorsepulti la patrinon.

Kaj ne suferos plu la Homan sinon
la Mono.

La 12-an de januaro 1923.

Tradukoj de Imre Szabó

Endre Gerelyes
(1935–1973)

KAINO

Rapidpaŝe ili trančis al si vojon tra la ebenaĵo. Sub la piedoj krakadis la salvioj, la suno, kvankam indulgeme tamen ne malmulte bruletigis ilian haŭton. En la sakoj plektitaj el basto pli kaj pli peziĝis la salo. Unu el la junuloj koleriĝis.

– Idiotaĵo, rampadi tiel malproksimen por preno de tiu ĉi aĉaĵo. Tie, apud la salo oni devus konstrui domon.

La alia, kiun nuntempe jam ne timigis la grumblema naturo kaj ĉiama pifpafa malkontenteco de la frato, gaje sed senridete lin alrigardis.

– Eĥ! Ĝi estas bona loketo.

– Mi ne povas kompreni, kial ili persistas ĉe tiu mizeraĉa lagobordo.

– Ne ĉe tiu ili persistas. Ankaŭ vi scias, ke de tie nur je duontaga iro estas la Malpermesita Regiono. Malfacile estas disiĝi de tie, kie homiĝis la homo.

La pli aĝa demetis la sakon kaj viŝis sian ŝvitkovritan frunton.

– Frato – li diris hezitante – ĉu vi kredas tiun paradizan historion? Laŭ mi, ili elpensis ĝin, kaj per tio ili lulis nin dormi ĉiuvespere.

– Mi ĝin kredas. Nome tion, ke *ili* ĝin kredas. Kial ni detruus ĉi tiun belan legendon, kiu donis sencon al nia vivo? Kaj se eble ĝi ne estas legendo? Kaj se tamen ĝi vere okazis?

Kaino kolerekscitite alrigardis sian fraton:

– Nu jen, ĉu vi vidas? Jen per kio vi flatadis vin en ilian amon. Jen pro kio estas vi la bona eta knabo. Kaj mi...

– Ne. Vidu, ĉi tion vi jam plurfoje ĵetis al mi riproĉe. Mi kredas, ke ankaŭ min ili amas ne pli ol vin. Ni devenis el la sama sango, vi kaj mi.

Kaino amare ekridaĉis:

– Preskaŭ samformaj ni estas.

Habelo restis senparola, ili portis plue la sakojn. La suno nun jam senindulge torentis sur ilin, la tero iĝis arida, kaj fore montegoj tremis en la varmega aero. Tiel formortinta ŝajnis tie la mondo, kvazaŭ nur ili duope ekzistus sur la tuta tero. Sed nun ili vivis jam sur ĝi kvarope. Loze kaj elane ili kuris kun la sakoj. Kvankam ŝarĝo katenis ilin, ili soifis kaj sopiris je la rapida movo. Sur iliaj ŝultroj pezegis la salo, la bastoplektaĵoj premis kvadratetojn sur ilian brunan haŭton. Ili evitis la iom grandajn ter-aglomeraĵojn, kelkfoje ili vadis ĝis talio en la susuranta herbo. Habelo kuris atenteme ĉiam malantaŭ sia frato. Li ne volis kun li konkuri.

– Kaj ankaŭ pri io alia mi volas vin demandi.

Kvar tagojn ili iris kune antaŭen. Kune kaj ankaŭ unu por la alia ili batalis kontraŭ akvo, suno kaj sovaĝbestoj. Ili kriadis atentige, se necesis, kaj evitis la leonojn.

– Demandu – instigis lin Habelo.

– Ankaŭ vi, ĉu ne, ankaŭ vi vidas, ke nia patro maljuniĝas?

– Mi vidas.

– Apenaŭ pasos dek jaroj, kaj ni jam povos lin venki.

Habelo rigardadis la vizaĝon de sia frato, tiun vizaĝon, kiu, en maniero minaca kaj strange ĝojiga, estis tiel egala al la lia. Kelkfoje ili kune enrigardis la akvospegulon de la riveroj, kaj tiam tremante li ludis kun la penso, kiu spegulbildo estas do lia propra.

– Mi ne volas lin venki.

– Ne? Ĉar vi estas stultaĉa bovido.

– Eble, mi estas tio. Per unu fingro mi ne tuŝos lin. Kaj ankaŭ vi ne faru!

Kaino ekridis.

– Ej, hej! Kaj kiu tion al mi malpermesos?

Habelo restis senparola, kun la ŝarĝo ili kuris plue. De sur ilia korpo verŝiĝis la ŝvito, la etaj akvogutoj trafluetis sur ilia dorso, kaj la salo mordis jam iliajn ŝultrojn. Antaŭ ili perdrikoj alarmiĝinte ekflugis kaj kvikinte rifuĝis. Fore, kie la ĉielo kaj la tero kunfluis, pli bluete ol foliverde aperis la borda arbaro de Eŭfrato. Ili ambaŭ malpeziĝis. Ni transsavis nin – ili pensis, kaj revenis en ilian cerbon la memoro de la malstabila, kariko-ĝiba marĉo, la aro de serpentoj, kaj la danĝero de la terura leono, de la leono, el kies speco Adamo tiom multe mortbatis, kaj kontraŭ kiu ili *ankoraŭ* ne rajtis stariĝi. Ili alrigardis unu la alian, kaj ilian koron preskaŭ inundis la frata amo. Ili alvenis hejmen.

– Rigardu nur – diris Habelo, kaj lia frato ĝoje aŭdis, ke li spiregas – supozu, ke vi venkos la patron. Kaj kio okazos pri mi? Ĉu vi batalos ankaŭ kun mi?

Kaino kaŝe rigardmezuris sian fraton, observadis liajn robustajn brakojn, korpon kaj fortajn koksojn. Kvazaŭ sin mem li rigardus. Tamen ne. Habelo estas alispeca estaĵo. Li estas la *amata*, la patrino dorlotas ja nur la pli junan fraton, la patro alridetas nur lin. Kelkfoje Kaino dezirus diskriegi vee kaj sufokiĝante, proklami, postuli hurle, ke ankaŭ li estas ĉi tie, ankaŭ lin ili amu. Li restis sola, sen ili tri, kaj eble vivis kontraŭ ili tri. Venĝo kaj ambicio ardigis lin; li havis jam tro sufiĉe el sia durkorpa kaj mol-anima frato. Kun kiu – li sciis – li ne bezonos batali. Ridetante li miris pri la naiveco de Habelo.

Ili kuris malsupren, surkalkane ili glitis de sur la sabla alta bordo. Ili svingis for de la ŝultroj la sakojn, kaj tiuj krake frapiĝis al la gruza, blu-argila akvobordo. La riverego baniĝanta en sunbrilo nehaltigeble migris inter siaj bordoj. Blankaj birdoj fulmetis super ĝi. La mondo brilegis, disĵetis fajrerojn. Ili ekvadis la akvon, enprofundiĝis en ĝia grizverda sensuna mondo. Ili elmergiĝis, avide enspiris la

aeron, elnaĝis al la bordo, retrosvinginte sian hararon ili rigardis, kiel ruliĝas la akvoglobetoj sur iliaj muskoloj. Ili ruladis sin en la borda sablo, forkuris kaj serĉis arbotrunkon, entiregis ĝin en la akvon, ŝovis ĝin al la sakoj kaj ligis ĉi tiujn per tenacaj ĉiroj sur la trunkon. Poste ili enakviĝis, naĝis tie, apud la putra trunko, trankvile ili drivis kaj transvenis.

Sur la hejma bordo ili longe ripozis. Habelo stariĝis, longe rigardis la mildan montetan regionon, en kies iu deklivo, tie, staris ilia domo. Kaj ĉar li estis juna, ne mutis la emocio, per kiu li pleniĝis, li saltetadis, batis la dorson de sia frato, kaj tuj poste jam interkroĉiĝinte ili ruliĝadis sur la sablo. Bona lukto ĝi estis. Habelo ridis, ĝojis pri la forto de siaj brakoj, pri la hejma regiono. Ili premis la fruntojn unu al la alia, la piedoj sinkis ĝis maleolo en la delikatan sablon. Tiel bele fajfadis la vento. Ili falegis sur la teron, luktis anhelante kaj ŝvitante. Kaj tiam Kaino liberigis sian brakon kaj frapis en la vizaĝon de Habelo. La pli juna kuŝis stupore kaj sendefende apud la akvo, de sur lia frunto en la buŝon fluetis la sango. Li silentis, kvankam rapide li rekonsciiĝis, li kuŝis kaj pensadis. Kaino malsupreniris al la rivero, ekvadis kaj lavis sian vizaĝon. Li revenis, turnis sian malsekan frunton al sia frato. Raŭke li diris:

– Sufiĉis. Ni iru hejmen... frato.

Ili demetis la sakojn kaj atendis. El la trabo-domo unue Eva elpaŝis, malantaŭ ŝi venis la patro. Ŝi kuris al ili, ĉirkaŭbrakis, premis ilin sur la bruston, kaj per sia longa hararo kovris la du kapojn, ploris. Adamo malpeziĝinte kaj kun gaja triumfo rigardis ilin.

– Ili alvenis – li diris –, brave. Iom malmulte da salo vi kunportis.

Eva delasis Kainon, kaj ĉi tiu silente rigardis ilin. Malantaŭ ili, sur la arbustplena vepra montet-deklivo trakuris cervo; ĝi haltis kaj gapadis al ili.

– Fileto – ĝemetis Eva kaj karesis Habelon –, mia unusola, ununura!

Kaino turniĝis, ekvidis la cervon kaj ĝin kuratakis. La besto provis rifuĝi, kvazaŭ de antaŭ fulmo ĝi kurus. La knabo ĝin atingis, sursaltis, terenfaligis, evitis la falĉantajn fer-durajn hufojn, turnis la beston sur la dorson, kaptis la femur-radikon de ĝiaj unuaj gamboj, kaj disŝiris ilin. La cervo ekblekis, poste kun disŝirita haŭto kaj dismalfermiĝintaj ripoj ĝi mortis. Habelo elvolviĝis el la brakumo de la patrino kaj per timaj okuloj alrigardis la fraton. Tiam Adamo, en kiu ankoraŭ vivis la paradiza nostalgio, diris kun ŝtoniĝinta vizaĝo:

– Venu ĉi tien!

Kaino spiregante leviĝis, dum momento konsideris, poste iris al la patro. Li levis sian kapon, preskaŭ tiel alta li estis jam, kiel Adamo.

– Ĉu vi malsatis?

– Ne.

Adamo batis lin kaj la knabo ĝemante, laŭlonge falis surdorsen. Lia rigardo fiksiĝis sur Habelo. Estis silento. Eva kaŝis sian vizaĝon en la manojn.

– Spertu mian bonecon – diris Adamo kaj etendis la manojn al la filo. – Nun iru vi ambaŭ. Vi alvenis, sane kaj sen manko de la membroj. Ofero koncernas *Lin*, kiu sammaniere amas nin ĉiujn.

Ili iris al la altaro, amasigis sekan brullignon sur la angulecaj steatit-platoj, en iliaj fortaj manoj krakadis la kalvaj branĉoj. Ili portis ardaĵon el la senĉese brulanta familia fajrujo, ekbruligis sube, kaj kiam alte flagris la ŝtiparo, ili ĵetis sur la fajron junan ŝafviandon kaj ĉi-jaran hordeon. La viando bruletiĝis kaj la odoro de la iom malseka ligno ĉirkaŭflirtis ilin. La fumo de la altaro de Habelo rapidege ascendis al la ĉielo. Kaino staris – kiel se ŝlimo katenas erarvaganton – ĉirkaŭfermite de nigra fumo ĝis la ŝultroj, rigidiĝinte pro sufoka furiozo. Li estis senmova, atendis la sanĝon, el liaj okuloj fluetis la larmoj eltorditaj de la fumo. Nenio okazis. Tiam en lia kapo komencis tamburi la sango, sur la kolo kiel serpento fluktuadis la arterio.

– Jen, finite – li murmuris kaj piedbate forigis la fajron de sur la ŝtonplato de sia altaro.

* * *

La Eternulo kontente retrokliniĝis sur sia brilanta trono. La kosmo malrapide tamen certe konstruiĝadis: ĉi-minute li funkciigis unu novan galaksion. La planedoj, spiralnebuloj kaj steloj funkciis korekte.

– Dank' al Dio – li suspiris – ĉi tio do estas preta.

En la kosmo disvastis posttagmeza trankvilo kaj tute mallaŭte ĝis tie filtriĝis la muziko de la sferoj. La serafoj atendadis en respektplena silento. Li trarigardis sian imperion kaj la okuloj ekripozis sur la Tero.

Li enpensiĝis. De kiam okazis tiu Paradiza afero, li ne atentis pri ili, li, simple, forgesis ilin. Eble – li meditis iom embarase – mi agis kun troa subitemo. Fine, sole du aĉaj pomoj... Eh, la virto de la kreantoj estas la konsekvencemo.

Li observadis la Teron. Kaj – ĉar lin, el motivoj ĝis nun apenaŭ klarigitaj, speciale allogis ĉi tiu lia kreaĵo – li plezure rigardadis la verdantajn kampojn, muĝantajn marojn de ĉi tiu planedo. Li atenteme observis la ĉirkaŭaĵon de la Paradizo, serĉis Adamon. Sur la bordo de iu lageto altis trabo-domo, kaj sur la ŝtonaltaro trankvile fumadis la estingiĝanta ardaĵo. Kaj tiam konsterniĝinte li kliniĝis antaŭen. Iom malproksime de la domo, en la surtretita herbaĵo, kun kapo en iu arbusto, kuŝis homo. Kadavro. Li vidis precize, ke oni debatis ĝian kapon de sur la kolo preskaŭ kiel kukurbon.

La Eternulo dum minuto rigardis senkonsile, poste li puŝis la polmon al sia frunto.

– Nu, kompreneble. Jen la *Kaina faro.*

Apud la kadavro de la knabo, Eva kuŝis sur la tero, sian longan hararon la polvo farbis griza. Adamo staris kliniĝinte super ili du.

La Eternulo per unu manmovo disflugigis siajn ĉefanĝelojn, kaj senprokraste ekvojis. Kun terura rapideco li kuregis en la kosmo, kaj dum pli kaj pli proksimiĝis al la

Tero, lia aspekto iom post iom aliformiĝis. Kaj kiam liaj piedoj ektuŝis la teron, li aspektis jam preskaŭ kiel homo. Li haltis apud la domo, la manojn metis sur la trabojn malglate prilaboritajn el arbotrunkoj.

– Bona laboro – li murmuris kaj poste per urĝaj paŝoj li daŭrigis la vojon. Malantaŭ la tragika grupo li haltis kaj mallaŭte diris:

– Adamo!

La viro sin turnis, rigide rigardis la Eternulon, kaj poste frunt-alsube falis sur la terbulojn.

– Sinjoro! – Kaj kiel la infano, kiam ĝi povas rifuĝi al la patro, kiam ĝi ne plu bezonas esti forta, liberiĝinte kaj preskaŭ feliĉe li ekveis. Liajn grandajn ŝultrojn skuis la ploregо.

– Adamo! Kion vi faris?

Eva leviĝis, turnis sian larman-pulvan vizaĝon al la Eternulo.

– Ne ni faris, Sinjoro!

– Saĝe mi scias. Kion vi devis fari, ke ĉi tio povis okazi? Kaj kion vi faris, ke ĉi tio ne povu estiĝi?

Adamo, iom levinte la kapon de la tero, diris amare:

– De kiam ni kondutis malinde kaj vi punis nin, ni restis solaj.

La Eternulo grakis.

– Sed mi ĉiam ripozigas sur vi mian patran rigardon. Gvidu min en vian domon kaj ni priparolu la aferon. La lasta honorceremonio havas tempon.

Adamo leviĝis, kliniĝis super la kadavron kaj kovris tiun teruraĵon, kiu antaŭe estis la vizaĝo de lia filo.

En la domo ekscitite iris-venis la virino. Ŝi metis sur la tablon kaprinan lakton, freŝan viandon kaj hordeo-panon. Ŝi kuris alporti salon, tiam denove ŝi ekploris, sed per rapidaj paŝoj ŝi fervoris antaŭ sia potenca gasto. La Eternulo kun etaj ĝemoj malleviĝis sur la ŝtipon kovritan per ursofelo. Li rigardmezuris la staturon de Eva.

– Vi dikiĝis, filino.

La virino ruĝiĝis, sub la larmoj ŝi ekridetis kaj fermis la okulojn...

– Mi scias, Sinjoro, de kiam mi naskis, kaj la ĝemeloj...

– Kiuj? – la Eternulo terure konsterniĝis – pri kio vi parolas?

Adamo ĝenate alrigardis sian vivkunulinon, li timis, ke ili kulpis ian eraron. Ankaŭ Eva timiĝis kaj balbute sin ekskuzadis:

– Kiel vi saĝe scias, nelonge post la elpelo, mi naskis du ĝemelajn filojn. Kun doloro mi naskis ilin, Sinjoro, sed mi havis ĝojon en ili. Tiel samformaj ili estis, egalaj laŭ vizaĝe kaj stature.

– Do, ĝemeloj... – la Eternulo meditis – ĝemeloj ili estis. Sekve ili estis harplenaj, krud-korpaj, sovaĝaj kaj senindulgaj?

Ili ambaŭ timiĝinte rigardis, silentis, eĉ memori ne kuraĝis pri siaj sveltaj, altaj, belaj filoj.

– Samformaj, ĉu ne? Aha. Kaj kiel vi distingis ilin per viaj limitaj mensoj?

– Nu – Adamo pripensante serĉis la vortojn – Habelo estis tia... Habelo estis pli stulta.

– Ne – oponis Eva, sed pro ŝiaj du ordonantoj ŝia voĉo apenaŭ aŭdiĝis – ne! Mi konis lin! Li estis pli milda kaj kuraĝa.

– Nu do – la Eternulo lace retrokliniĝis kaj resumis la okazintaĵojn – Kaino estis ĵaluza kaj mortigis Habelon.

– Vi diris – hezitis Adamo – Vi, kiu estas ĉiopova, mia Dio.

– Kiel vi povis allasi – ŝancelis la kapon la Eternulo –, kiel vi lasis, ke la murdo enloĝiĝu en ĉi tiu mondo? Ĉu vi ne estas la mastro de ĉi tiu tero? Kaj ĉu viaj brakoj ne estas ja fortaj, ke vi obeigu kaj preventu la krimon?

– Forta mi estas kaj mi sufokas per manoj la leonojn. Sed, sciu – Adamo enpensiĝinte karesadis sian mentonon – ĉi tiuj ne timegis mian rigardon, kaj kvankam unu bato de mia pugno faligis ilin en la polvon, ili tenis sian rigardon sur mi gaje kaj fierege. Strangaj knaboj ili estis, kvazaŭ ne mi estus ilin generinta.

– Sed kiu alia? – ekkriis koleriĝinte la Eternulo, ĉar sufiĉis jam por li el la surprizoj. – Mi kreis vin kaj nur vin mi kreis kiel viron.

– Sinjoro – Adamo surgenuiĝis – via kreitaĵo mi estas kaj patro de miaj du malfeliĉaj filoj. Malbona estis, kion mi diris.

La Eternulo leviĝis, kolere rigardis ilin, eĉ ne tuŝis la viandon, kaj elpaŝis el la domo.

* * *

Li enpensiĝinte flugegis super la nuboj, la okazintaĵoj de la tago li iom konfuzis. Sed kiam li atingis la nivelon de la unuaj steloj, li denove estis jam la Eternulo. Li haltis kaj disrigardadis.

Inter la ruĝaj sablorokoj de la dezerto, malatente pri la krevaĵoj kaj akraj ŝtonoj, jen iris antaŭen la murdisto. Sur lia frunto ardis jam la makulo. La Eternulo dum momento lin observis kaj miris, ĉar li kalkulis je kliniĝintaj ŝultroj, timema rigardo. Li ekparolis tiam, lia voĉo tondre flugegis tra la mondo kaj la riveroj timiĝinte kaŝis sin en siaj fluejoj.

– Kaino!

Tiu, tie malsupre, haltis, tamen, ĉar li estis plu ne kreitaĵo sed homo, li kontraŭdiris la muĝantan voĉon de la Eternulo.

– Habelo mi estas.

Sekvis profunda silento. La Eternulo fikse rigardis la aŭdacan kaj liberan vizaĝon de la junulo, kaj kvankam li iomete hontis, vole-nevole li trovis en ĝi plezuron.

– Kion vi faris?

– Kaino volis min mortigi, tial mi prenis de li la armilon kaj mi lin mortigis.

– Do, vi murdis.

– Sindefende mi murdis.

– Elpuŝita vi estas, ĉesis la epoko de la patra defendo. Sola vi devas jam stari ankaŭ kontraŭ la leonoj. Ili fariĝis

Gábor Garai

Jarcentfino

La jarcentfino venas, kvankam sen plenumi nian postulon,
ekzistas dekadencaj poetoj kaj iom da nov-secesio;
sed la sekuro paca tiun tuton ne saturas,
ne kiel nestofaraj birdoj, la komputiloj pepetas,
timige ni – kaj kiusorte – la terglobon traaras,
raketoj televidaj fiksokulas sin tra la foreco,
kelktempe ekŝokiĝas la sistemoj danĝer-indikaj,
kelkloke oni bombojn eksplodigas, ŝtatvirojn rabas,
kun ne tro idilia fino la morgaŭo nin alstrabas,
al la homara sobro tagon kaj tagon ni apelacias,
sed kiel finos niaj kreitafoj, tion ni eĉ ne scias,
post du mondmilitegoj la jarcento kian resumon havos,
transpaŝi terurpordon de genocido ĉu sensavos,
ĉu eble la pereon alrektos? – kaj niaj petvortoj ĉu vane
alsonas nin mem, estos ni frakasantaj-frakasataj same,
ni ĉiuj sopirantaj intimon en la fremdiĝo-mizero,
ni, kiuj eĉ la ŝtonojn moligas, ni, kiujn timas eĉ la tero?

Ni vere ne deziras idilion, al ĝi ne plu ni strebas
post ke jam hirudnuboj super ni disŝvelante ŝvebas,
nur ĝisatendi morton naturan kun espero sana,
ne koketante al la transmonda kompenso por ni vana,
ni kreus nur estonton por ĉiu nia hejmo kaj filo,
azilon firman en la tempo antaŭ la ŝancela foriro,
post kiu statistinta generacio malaperos el la sceno,
herede restos – se ne cetero – altevoluinta dubo-premo
en la mucidaj frazoj kaj promesoj densfumaj,
kaj nin klinante ĝisas ni sen vibroj palpebrumaj,
kaj lasas al la idoj, ke senkrede oni tamen ne povas
ekzisti, kvankam ĉesas la jarcento kaj la jarmilo novas,
dum niaj idoj – magraj, maldensbarbaj Raskolnikovoj –
transvarmas stratojn, placojn de ĉi mondo ŝajne en sencelaj movoj,
kvankam – kiel ajn estos – ili elportos ĉimondan sorton, ne eston ermitan,
kiel heliko sian konkon, neniu loĝas destinon alĝustigitan,
ne povas esti svena sklavo senaga de la determino,
la vaksoklošon de la apatio trabrilos volo kun obstino,
kaj ili trasuferos-vivos – ĉar kiel eskapi? – nunon-futuron,
la jarcentfino venas, kvankam sen plenumi nian postulon,
ekzistas nekonata minaco en ĝi kaj kaŝe bona misio,
ekzistas dekadencaj poetoj piaj kaj ankaŭ nov-secesio,
la persikujaj ĝermoj super la kapoj silenton konturas,
sed la sekuro paca tiun tuton ne saturas;
la monda tuto rondas, sed iuj partoj rondi ne pretas,
ne kiel nestofaraj birdoj, la komputiloj pepetas;
kiel paneroj, niaj spermoj senutile disfalas,
timige ni – kaj kiusorte – la teron traaras;
raketoj televidaj fiksokulas sin tra la foreco,
trairi kiu pretus la kolektivan ĝangalon de soleco,
dum nerve ekŝokiĝas la sistemoj danĝer-indikaj,
torentas larmoj, cindro al la kapoj ŝvitaj, brulvezikaj;
sed ni ekzistas ne por almozi indulgon – sed por fari
ĉiun indulgon eblan antaŭ ol nin al neniiĝo prepari,
por savi la savindan, kiun kreskigis la vivdeziro,
foliojn arbo, sian vivan idon mortema homfilo,
ĝis la jarcento ĉesos, kaj alvenos la nova jarmilo.

Tradukis: Imre Szabó

viaj leonoj. Krome, vi opinias, ke poreterne vi finis. Vi eraras. Vi ambaŭ devenis el la sama sango, kaj en vi troviĝas Kaino, tiel same kiel ankaŭ vi troviĝas en li. Stultega. Nun eterne vi devos plu batali.

– Tiam do mi batalos. Kaj apud mi batalos miaj idoj al mi similaj. Kaj sciu, mi kredas, ke venos iam la tago, kiam li tiom jam malfortiĝos, ke mi ne devos lin murdi. Sed vi scias ĉi tion pli bone.

La Eternulo kolere ekkriis:

– Kiel, per la diablo, mi sciu, kion vi turnadas en via malbenita cerbo? – Habelo ekridetis kaj la Eternulo eĉ pli koleriĝis. – Tuj malaperu de antaŭ miaj sublimaj okuloj, vi, fripono!

Habelo daŭrigis sian vojon. La Eternulo restis kaj meditis. Li rigardis la facilan tamen klopodan movon de tiu eta figuro, kaj pensis pri tio, ke Adamo ĉiam ĵetiĝis vizaĝ-altere parolante kun li. Sed ĉi tiu ridetis. Iom malaprobe li konstatis, ke li tute ne estas certa, tute ne scias precize, ĉu li estas trompita aŭ ne, kaj ĉu tiu tie estas Kaino aŭ la alia. Sian grandan mentonon apogante per la pugno, li sidis kaj esperadis. Li esperis, ke tiu estas li.

Habelo... Tradukis: Valeria *Szabó*

Szilárd Bálint

La neatendita evento

Ida Langa universitata studentino naskis en la hospitalo de urbo Z. sanan infanon. Oni matrikulis la infaneton laŭ la familia nomo de la patrino, kiu ne havis edzon. La flegistinoj rimarkis, ke dum la posta semajno neniu vizitis ŝin, nek venis telegramoj aŭ leteroj. Post unu semajno la naskinta fraŭlino malaperis, kaj malgraŭ zorga serĉado ŝi ne estis trovebla. Restis en la hospitalo la infano kaj la persona legitimilo de ŝia patrino.

La hospitalo sendis alvokon al ŝia adreso por ke ŝi forportu ŝian infanon. Oni ankaŭ informis la policon, transdonante la legitimilon. Baldaŭ detektivoj serĉis la studentinon en ŝia loĝejo. Tie estis nur la patro, laŭ kiu ŝi troveblas en la universitato. Tie la dekano vokis Idan, kiu tre miris pro la demandoj, kaj asertis, ke ŝi neniam naskis. Profesoroj kaj studentoj unuanime asertis, ke Ida estis ĉiam svelta, neniam ŝajnis graveda, kaj en la problema periodo ŝi regule vizitadis la universitaton.

La detektivoj kredis al la atestantoj, kaj sekve ili iĝis tute senkonsilaj. La policestro tamen ordonis medicinan ekspertizon, kiu rezultigis, ke Ida vere ne naskis, eĉ ŝi estas virga.

Ida studis ĉe la filozofia fako. Ŝia amindumanto estis jurstudento. La klaĉo rapide disflugis pri la tikla temo, kaj iutage la jurstudento ne bremsis sin antaŭ Ida.

– Vi kondutas, kvazaŭ nenio okazis, kara Ida! Diru al mi la veron.

– Laŭ la homoj mi naskis filinon en fora urbo ĝuste tiam, kiam mi sidis sur la benkoj de nia universitato! – kaj ŝi montris la leteron de la hospitalo.

– Do vi havas laŭleĝe filineton, matrikulitan je via nomo... Nu, mi vidas du solvojn: aŭ vi transprenos la etulon kaj vartos ŝin...

– Eĉ mi mamnutros ŝin! – kriis Ida.

– Ne interrompu min... La alia solvo estas, ke vi petos, ke la sucinfano estu akceptita por ŝtata prizorgado... Ekzistas ja plua solvo, nome se oni trovos la veran patrinon.

– Dankon! Vi estas vera juĝisto, eĉ la faktojn eminente tordema juristo! – koleris Ida kaj turnis la dorson al la junulo.

En la familio de Ida pasis streĉitaj tagoj. Foje la patrino de Ida proponis viziti la hospitalon, por almenaŭ rigardi la infaneton. Tie la flegistinoj konstatis, ke ili neniam vidis la blondan Idan, ja la naskinta virino havis nigran hararon. Oni rememoris, ke ŝi ne volis diri la nomon de la patro, asertante, ke nek antaŭ la amorado, nek poste ŝi vidis lin, nur en la kampadejo iunokte.

La du virinoj longe rigardis la suĉinfanon, kiu kuŝis sur litkuseno kaj vigle gestadis. Ŝi havis bluajn okulojn, nigrajn harojn, kaj ŝajnis kvazaŭ ŝi amikeme ridetus al Ida.

– Belega ŝi estas – ĝemis Ida –, jen, la eta orfino ne imagas, ke oni cedis ŝin al la sorto... Mi preskaŭ emas alpreni ŝin!

– Prefere ni iru hejmen – respondis kun larmoplenaj okuloj la patrino de Ida.

Hejme la detektivoj jam atendis ilin kaj demandis:

– Ĉu vi havas person-legitimilon?

– Jes, sed novan, ĉar la antaŭan mi perdis, eble oni ŝtelis de mi en aŭtobuso.

– Domaĝe, ke vi ne jam diris tion. La afero jam estas tute klara. La naskinta virino misuzis vian legitimilon – diris la policisto.

– Certe... – meditis Ida. – Tamen ankoraŭ mi estas oficiale la patrino de tiu infano. Kio okazos pri tio?

– Se ni trovos la veran patrinon, tiam la afero estos en ordo. Se ne, vi havos eblon elekti inter pluraj solvoj.

La polico disponis por kolekti de la „aborto-komitatoj" la nomojn kaj ĉiujn indikojn pri la virinoj malakceptitaj por la ginekologia operacio, pro tro progresinta gravedeco. La respondoj alvenis tre malrapide, la tempo pasis longe, ĝis ĉiuj informoj kolektiĝis el la tuta lando. Post longaj ekzamenoj oni devis konstati, ke similaĵoj, sufiĉe dubŝancaj personoj amase troviĝas. La afero montriĝis efektive malpruvebla, pro tio la polico finfine ĉesigis la enketon.

Tamen la jurstudento trovis bonan solvon, kiun Ida akceptis kun vera plezuro.

* * *

Kara Leganto! La redakcio ne konas la bonan solvon, kiun proponis la studento. Tial ni petas vian helpon: skribu la solvon al ni, uzante 30-40 tajpitajn liniojn. La plej bonan solvon ni publikigos kaj la aŭtoro ricevos libropremion. Limdato: du monatoj post la alveno de tiu ĉi tiu historio.

DAŬRIGO

de la rakonto „Skandalo en la vilaĝo"

Daŭrigas: Jiří Karen (Ĉeĥoslovakio)

(Dua parto)

Ada alveturis kun Adamo surtandeme al la ĉasgardista domo en vilaĝo X. Kamarado de Adamo, Georgo, startis tie ĉi en sia kariero kiel nova arbaristo. Antaŭ nelonge li edziĝis kun Georgeta. La junaj geedzoj invitis nian amparon vivi tie ĉi dum unu semajno. La revo de Georgo kaj Georgeta, vivi en la arbaro, for de la civilizo, sen bruego, meze de la naturo, ankoraŭ pura, realiĝis por ili bonŝance. Sed esti feliĉa estas nur duono de la feliĉo. Pro tio ili invitis Adan kaj Adamon ĝui ĉiloke la donacojn de la amo, ĝis tiam nur sekrete kaj malperfekte eblan.

Adamo post tiu semajno plu laboros en la proksimvilaĝa kooperativo en funkcio de inĝeniero-agronomo. La kooperativo sendis lin studi altlernejon

Tibor Beŝŝenyei

LA HAZARDO

Ie, en fora lando okazis foje: Vagonaro kuris en malhela nokto inter montoj kaj valoj, tra tuneloj kaj sur pontoj. La lokomotivestro kaj lia helpanto atenteme kaj sindone plenumis sian taskon.

Estis konfiditaj al ili la sekureco, eĉ la vivo de plurcent vojaĝantoj kaj de ĉio, kion la vagonaro portis.

Fru-printempa, malvarmeta nokto estis kaj la vagonaro kuris, kuregis sur sia decidita vojo, tra relŝanĝiloj, alternaj reloj, de stacidomo al stacidomo. Ĉio estis en bona ordo: la maŝinoj kaj direktiloj kaj la ceteraj necesaj muntaĵoj funkciis sendifekte.

En unuaklasa kupeo sidis juna geedza paro; ili faris nuptovojon kaj estis neesprimeble feliĉaj, ĝojante pro la vivo, juno, kaj pro tio, ke la sorto donacis ilin unu al alia...

En la apuda kupeo maljuna, malsana virino kun sia flegistino, kiu gardis ŝin, zorgis pri medikamentoj kaj manĝaĵoj regule. La maljunulino veturis al kuracloko kun la espero de plena resaniĝo.

En la dua klaso laboristoj kartludis, frapadis la kartojn kaj gajnis monerojn por trinki. Ili vojaĝis hejmen, pasigi la semajnofinon kun la familio.

En la kontraŭa kupeo sidis junulo revante pri sia amatino.

Sur la benko kontraŭ li juna virino sidis kun bebo, kiu kelkfoje ekploris, sed post iom da lulado trankviliĝis kaj dormis plu.

En la poŝto-vagono estis nenombreblemultaj leteroj, kiujn sendis unu al la alia la plej diversaj homoj, kun malsamaj informoj.

En alia vagono funebris familio, kun larmoplenaj okuloj, ĉar ili venis de la enterigo de la kara avino...

Kaj en la sekva kupeo kantadis mallaŭte gejunuloj, por ke ili ne ekdormu, ĉar ĉe la sekva haltejo trans la rivero ili devis elvagoniĝi.

Do, ĉio estis en la plej bona ordo, kiel kutime.

Sed ĵus atenteme rigardante la lokomotivestro rimarkis inter la reloj strangan figuron, saltantan tien-reen inter la reloj. La figuro jen aperis, jen malaperis. – Foje ĝi formis grandan – ŝajne danĝeran – baron, jen figuron de kranio aŭ fluganta skeleto...

Nu, la lokomotivestro ne estis timema, sed liaj nervoj jam ne longe eltenis tiun ĉi tre strangan fenomenon.

Li demandis de la helpanto: – Ĉu la reflektoroj ne difektiĝis? Kio povis okazi? Ĉe la lasta stacio ankoraŭ ĉio estis en ordo... Fine li haltigis la vagonaron kaj petis la helpanton, ke tiu rigardu, kio okazis.

Tiu eliris por rigardi, kaj evidentiĝis, ke en unu el la reflektoroj, sub ĝia vitro flugadis tien-reen malgranda papilio...

La nervozaj vojaĝantoj jam pretendis veturi plu, kiam venis la atentigo el la proksima gardista domo:

– Ne veturu plu! La glacia torento detruis la ponton super la rivero! Se vi veturos plu, nepre vi ĉiuj pereos...

– Ĉu ĉio ĉi estis simpla hazardo? ...

---

en la urbego. Fininte la studadon, li revenis labori al la kooperativo.

Nun Adamo iras ĉeflanke de Ada, promenante tra la bela arbaro ankaŭ por primediti sian situacion. Adamo rakontas al Ada pri sia kolego, kiu scias gajni simpatiojn de siaj kunlaborantoj kaj subuloj. Li alskribas laborhoron, fermas okulon, se iu forportas ion. Li ofte sidadas inter siaj kunlaborantoj en la gastejo. Ne mankas ankaŭ okazo por aĉeti bierbarelon kaj eltrinki ĝin kune en oportuna momento. Tiel li laŭpaŝe gajnis simpatiojn. Kaj lastatempe la kooperativestro jam ekplendis, ke Adamo ne estas sufiĉe sperta, ĉar li venis el urbego, do eventuale estos bone modifi liajn taskojn.

Do Adamo, ek al problemoj, al zorgoj, ek al bataloj!

Ada iras ĉeflanke de Adamo kaj ankaŭ meditas. Parte silente, parte per vortoj. Ŝi estas feliĉa, vere kaj profunde. Adamo estas la viro, kiun ŝi amas, kiun ŝi ŝatas. Neniel li volas sinjori al ŝi. Ĉiam atentoplene li demandas: ĉu vi deziras tion aŭ preferas alian? Ŝi multe suferis sub la jugo de sia patro, kiu nur ordonis, dekretis, sed neniam demandis, kio konvenas al ŝi? Sed kion faras, kiel vivas ŝia panjo? Kiom da kritikoj ŝi devas aŭskulti! Pri ĉio ja kulpas la patrino. Kompatinda panjo, pensas Ada. Ververe ankaŭ ŝia vivo iomete tristos sen esti hejme ĉe la patrino. Ŝed kiel transporti la abismon inter patro kaj Adamo?

Ada mo estas vere brava kaj aminda homo. Li certe eminentos kiel edzo kaj patro, sed li vere ne karieros. Eble ankaŭ ŝi devos ie labori por helpi sian novan familion ekonomie, kvankam ŝi estas malmulte sperta. Sed kial mediti pri la futuro? Se la vivo plaĉos ŝi restos ĉe Adamo. Sed se la vivo malplaĉos? Nu, ni vidos. La futuro montros ĉion.

Ili jam revenis el la promenado kaj eniris la arbaristejon. La tutan semajnon ili vivos senzorge, nur por sia amo. Jes Adamo, jes Ada, ni amas vin. Ĉu porĉiame? Kial cerbumi? Ni vidos!

Jenő Heltai
(1871–1957)

MILLICENT

Sur la lagbordo mi renkontiĝis kun mia malnova amiko, lordo Notapenny. La nobela lordo tenis longan bastonon en sia mano, sur la fino de la bastono estis longa ŝnureto, la ŝnureto pendis en la akvon. La nobela lordo fiŝhokis. Mi sidiĝis apud lin, kaj atenteme rigardis. En la kvieta, pura akvo mi vidis multajn fiŝojn, etajn, grandajn. Ili ekscitite tumultis ĉirkaŭ la hokitaj vermoj, flirteme pretersusuris kaj okulumis, sed ne buŝkaptis ĝin. Lordo Notapenny sen jako, kun fiksita rigardo, senmove toleris la impertinentan inciton, nur foje-foje li ŝancelis la bastonon, ĉu eltiris la hokon el la akvo, ĉu lasis ĝin pli profunden. Longe ni ne parolis unu al la alia. Fine min enuigis la afero, kaj mallaŭte mi diris:

– La fiŝhokado bezonas paciencon.

La lordo kapjesis, kaj averte, instrue flustris:

– Ĉio bezonas paciencon.

Li mutiĝis, ĉar la hokŝnuro ektremetis. Iu fiŝo movis ĝin. La lordo fulmrapide eltiris la bastonon el la akvo. Sur la hoko malesperiĝinta ciganfiŝo saltetadis. La lordo deprenis ĝin de la hoko kaj ĵetis ĝin al la ŝtonplena gruza bordo. La fiŝo kun malfermita buŝo ĵetadis sin, eksaltis, refalegis, baraktis.

Malantaŭ ni staris la ĉambristo, la olda James, blankhara kadukulo. La unusola heredaĵo, kiu restis post la patro de la nobela lordo, post Earl of Sixpence. Dum kvardek jaroj li vestis kaj razis la junan lordon. Rara precedenco de la anima nobleco; nuntempe la nobela lordo vestas kaj razas la oldan, sed ankoraŭ fidelan serviston. James kaptis la fiŝon, kaj ĝian kapon unu-dufoje tenere batis al mezgranda ŝtono. La fiŝo svenis, senmove etendiĝis sur la tero. Tiam James enŝovis ĝin en korbon. Tiu sceno tri-kvarfoje ripetiĝis, la fiŝoj kvazaŭ estus fervoriĝintaj pro la sukceso de la unua, ili pli ofte alhokiĝis. Post la kvina fiŝo la lordo kontentiĝis pri la kaptaĵo kaj survestis sian jakon. Mi vidis larĝan, nigran rubandon sur lia maniko. Diskrete mi demandis, kiun li funebras? Lia vizaĝo malserenigis, mallaŭte li diris:

– Mian junan edzinon. Ĉu vi ne sciis?

– Sincere mi konfesas, eĉ tion mi ne sciis, ke vi edziĝis. Permesu, ke mi postfeste gratulu, kaj samtempe esprimu ankaŭ mian profundan kondolencon.

La lordo kapklinis.

– Mi tre dankas pro ambaŭ.

Ni ekiris al la urbo, antaŭe la lordo kaj mi, tri paŝojn post ni kun la korbo kaj la fiŝhokista instalaĵo la fidela ĉambristo. Ni profundiĝis en ni, mute marŝis. La lordo subite haltis. Sian manon li metis sur mian brakon:

– Tio estas malĝoja okazaĵo, ne volonte mi parolas pri ĝi. La homoj estas neglektemaj kaj suspektemaj, sed vi estas mia bona amiko. Al vi mi povas rakonti. Vi baldaŭ komprenos. Cetere ĉi tie estas ankaŭ la olda James, li estis atestanto pri ĉio...

James malserene kapjesis. La lordo forprenis el sia poŝo la pipon, ŝtopis ĝin kaj ceremonie ekfumis. Nur poste li daŭrigis la historion.

– Millicent estis anĝelo. Kompreneble ŝi ŝatis disputi, obstine persistis ĉe tio, ke ĉiam ŝi pravas. Ŝi estis vanta kaj tro memfida, kiel ĉiu belulino; trodorlotita kaj postulema, kiel ĉiu riĉulino; senekzemple malcedema kaj trudiĝema; harstarige stulta; ne aŭskultis saĝajn konsilojn; senmense ŝi disipis la monon; la kompatinda estis ankaŭ kruele egoista; ŝi zorgis nur pri si mem; po kvin minutoj ŝi ofendiĝis, plendaĉis, grumblis, kaj de mateno ĝis vespero suĉis mian sangon. Kiel vi vidas, mi ne plibeligas la aferon; mi konfesas, ke la karmemora havis ankaŭ kelke da etaj peketoj. Ni devas rezignacie akcepti, ke neniu el ni estas perfekta. Nur tio estas grava, ke ni vivu feliĉe, kaj tiurilate ne estis ajna manko. Kiel mi ja diris, Millicent estis anĝelo. Iomete ŝi misuzis tion, tamen ŝi estis anĝelo. Ŝi sciis tion, pri si mem, kaj sciis, ke ankaŭ mi prijuĝas ŝin tia. Mi amis ŝin, do mi feliĉe toleris ĉiujn ŝiajn kapricojn; mi plenumis ŝiajn ordonojn; mi estis ŝia obeema sklavo; mi submetis mian kapon sub ŝian malgrandan pantoflon.

Ŝi planis pasigi la someron sur la franca marbordo en Deauville. Mi akompanis ŝin el Londono al Parizo, kie ŝi volis fari aĉetojn: kvar-kvin roboj, kelkaj dekduoj da ŝtrumpoj, parfumaĵo, kaj mi ne scias, kio alia. En Londono ankoraŭ mi havis multan laboron, nur post ok-dek tagoj mi povus havi la eblecon sekvi ŝin. Kiam mi adiaŭis ŝin en la Pariza hotelo, ŝi fervore pakis. En unusolan grandan ŝrankokofron ŝi klopodis enŝtopi ĉiujn havaĵojn. Kareseme mi avertis ŝin, la karan, ke dekkvin roboj, dudek paroj da ŝuoj, dekkvar ĉapeloj, dekdu bankostumoj, legio da intimaj vestaĵoj, parfumaĵoj, kremaĵoj, esencoj, arsenalo da tualetaĵoj, ŝaloj, naztukoj, ŝtrumpoj kaj aliaj virinaj havaĵoj ne povos lokiĝi en tiu ŝranko, eĉ malpli pro tio, ĉar ŝi volis kunporti ankaŭ romanon por legi. Millicent trankviligis min, ke la loko sufiĉos. Mi klopodis klarigi, kial la loko ne sufiĉos, sed tiu anĝelo nun jam iomete pli impete kriaĉis:

– Sole idioto povas diri, ke la loko ne sufiĉos!

Mi ne ŝatas, se mia edzino inter kvar okuloj nomas min idioto, do, mi sonorigis al mia fidela ĉambristo, ke li kun sia kvindek jara sperto apogu mian modestan opinion.. James kompreneble min pravigis. Millicent nun jam diris kolere:

– Vi ambaŭ estas idiotoj. Estas loko por ĉio, kaj kiam ĉio jam enestos, eĉ restos ankoraŭ loko.

Modeste mi ridetis, mia fidela ĉambristo nur balancis sian kapon. Mia juna edzino furioze stamfadis, kaj al mi ĵetis la ĉe-mane troveblajn, ne tro pezajn objektojn: la cindrujon, krome etan tablolampon. Ŝiaj okuloj timige briletis, kiam kun frosta kvieteco ŝi sciigis:

– Mi pruvos, ke la loko sufiĉos por ĉio!

Tuj ŝi ĵetis sin al la laboro, kun sorĉa lerteco ŝi lokigis ĉion. Kaj James kaj mi spiron retenante atentis, kiel ŝi artifikas kun la obstina havaĵo, kiel mildigas tiujn obeemaj, kiel platigas, faldadas, glatigas, metas ilin unu en la alian. Kiam ŝi finis, triumfante ŝi rigardis nin:

– Nu, idiotoj, kiu pravas?

Mi ne ŝatas, se mia edzino en la ĉeesto de alia homo nomas min idioto, eĉ tiam ne, se hazarde tiu alia estas mia ĉambristo. Cetere mi estas pacema, justa homo, mi amas Millicent-on, do, milde mi respondis:

– Vi pravas, mia anĝelo. Ĉiam vi pravas.

Aliulo akceptus ĉi tiun satisfakcion, sed la anĝela Millicent trovis tion malmulta. Nur dum momento ŝi ĝuis sian triumfon, poste per okuloj de fakulo, ŝi plene pritaksis la ŝrankokofron.

– Nun mi pruvos, ke aldone ankaŭ mi enlokiĝos.

Tiun deklaron mi juĝis stulta kaj aŭdaca, sed kiel decas al amanta edzo, mi ne kuraĝis protesti. Tiu anĝela sorĉistino ĉion kapablas, ankaŭ tion, ke ŝi trovos lokon en la plenŝtopita ŝranko.

Sed tio jam estis komplikita tasko. La afero ne iris glate. Millicent neniel povis loksidiĝi en la ŝranko. Ŝi koleretis, senpacienciĝis. Plena de boneco, mi diris al ŝi:

– Pripensu, ĉesu! Prefere mi akceptas, ke vi povas enlokiĝi.

Pro ĉi tio, kompreneble ŝi ofendiĝis. Denove ŝi nomis min idioto, kaj riproĉis al mi, ke mi ĝojas pri ŝia fiasko, kaj priridas ŝin, kial prefere mi ne helpas ŝin?

Mi mansignis al mia fidela ĉambristo kaj ni kun granda peno enpremis Millicent-on en la kofron. Estis amara laboro, daŭris pli ol unu horon, ĝis kiam fine ni fermis la fermoplaton de la kofro. Millicent venkis ankaŭ duafoje, ŝi fakte povis lokiĝi en la ŝranko. Ni devigite konfesis, ke, kiel ĉiam, ankaŭ ĉifoje ŝi pravis.

Mi sidiĝis apud la kofron kaj atendis, kiam Millicent signalos, ke ni levu la fermoplaton de la kofro. Post dek minutoj mi maltrankviliĝis, ĉar mi sciis, ke Millicent neniam estis preciza, kaj regule ŝi malfruiĝas ĉie, mi decidis, ke mi atendos ankoraŭ kvaronhoron. Kiam post duonhoro ŝi ne donis vivsignon pri si, en mi vekiĝis malbona konjekto...

La lordo eksilentis, ĝemis longe, kaj ridige rigardis antaŭ sin. Ekscitite mi turniĝis al li:

– Ĉu okazis katastrofo?

Lordo Notapenny, kiu dume jam duafoje ŝtopis sian pipon, unue ceremonie ekfumis, nur poste respondis:

– Katastrofo? Dependas de la vidpunkto... Ne, ne ektimegu. Millicent ne sufokiĝis en la kofro. Tio estus neebla, ĉar James kaj mi jam antaŭe distrancis la povrulinon. Nome, sen tio ŝi ne estis enpremebla en la ŝrankon.

El la hungara: János *Podani*

Georgi Mihalkov

Hermeso malaperis

En la centro de la urbo estas la komerca strato, kaj sur ĝi – la plej elegantaj vendejoj en kies brilaj vitrinoj videblas ŝtrumpoj kaj kravatoj, kalsonoj kaj mamzonoj, ombreloj kaj ĉemizoj, ŝelkoj kaj manteloj.

Proksime al la komerca strato, sur eta placo, estas la fonto de Hermeso.

En la marmora kuvo de la fonto staras ŝtonkolono, sur ĝi – statuo de Hermeso – la dio, protektanta la negocistojn kaj ŝtelistojn.

Sur la komerca strato de matene ĝis vespere regas tumulto. Multaj haltas ĉe la fonto de Hermeso; iuj trinkas akvon, aliaj sidas por ripozi sur la malaltaj ŝtonkolonoj, kiuj ĉirkaŭas la fonton, sed ĉiam kaj super ĉiuj leviĝas li – Hermeso, la helena dio, muldita el bronzo, juna, impeta kun fortaj muskoloj kaj ruza rideto, kiu kvazaŭ aludas, ke en nia mondo ĉio estas mono kaj negoco.

Neniu scias kiu, kiam skulptis lin, sed ĉi tie, sur la eta placo, ĉe la vigla eleganta strato, estas lia ideala loko – por protekti la komercojn sur la komerca strato.

Foje-foje, dum la aŭtunaj antaŭvesperaj horoj mi kutimas promenadi sur la komerca strato. La vendejoj estas jam fermitaj, kaj antaŭ la vitrinoj oni ne puŝas unu la alian.

Ĉivespere, kiam mi atingis la straton, io kvazaŭ subite pelis min antaŭen. Proksime sonis gitaro kaj vira voĉo kantis itale. Mi rapidigis miajn paŝojn.

Sur la eta placo, ĉe la fonto de Hermeso, kantis knabo. Ĉirkaŭ li dudeko da homoj staris kaj aŭskultis.

Mi faris kelkajn paŝojn kaj apogis min je vendeja muro. De tie mi bone vidis la knabon. Verŝajne li estis deksesdekok jara, lia vizaĝo palis, eble pro la aŭtuna frisko, liaj okuloj estis iom fermitaj. Li kantis kaj kvazaŭ ne rimarkis nin. Li kantis por si mem, ĉi tie, en la centro de la urbo, sur la komerca strato, antaŭ la vitrinoj kun la kalsonoj kaj mamzonoj. Li ne bezonis nin, nek nian monon, nek la aplaŭdojn, kiujn ni deziris donaci al li.

La vizaĝoj de la homoj, kiuj staris apud mi, ankaŭ palis, ĉu pro la aŭtuna frisko aŭ pro io alia – mi ne scias. Nun la homoj ne rapidis, iliaj okuloj estis serenaj, trankvilaj, kvazaŭ ĉiuj iliaj iĝis infanoj. Junulino, kun kelkaj libroj sub la brako, eble studentino, staris apud mi, ĉe ŝi – knabo kaj knabino ĉirkaŭbrakumantaj unu la alian, apud ili – okulvitra oldulo...

Ili ĉiuj estis senmovaj kaj kvazaŭ jam ne sciis kien ili rapidis ĉivespere.

Mi nevole alrigardis la fonton de Hermeso, kaj mi restis stupora. Sur la alta ŝtonkolono mankis la statuo de Hermeso. Tamen kiam mi venis la bronza ido staris tie!

Kelkajn minutojn mi strabis mire la ŝtonkolonon, kaj iom post iom mi komprenis ĉion. Kiam senmovaj ni aŭskultis la junulon, Hermeso descendis malrapide de la ŝtonkolono kaj silente malaperis. Ja, ĉivespere li ne estis bezonata sur la komerca strato.

Harry Harrison: sukcesa verkisto de sciencfikcio kaj esperantisto

Harry Harrison estas unu el la plej produktivaj kaj sukcesaj verkistoj de sciencfikcio en la angla lingvo. Li naskiĝis en 1925 en orienta Usono, laboris kiel komerca artisto; artdirektoro kaj redaktoro, antaŭ ol komenci sian sendependan verkistan karieron. Li ricevis multnombrajn premiojn kaj honorojn. Dum pluaj jaroj li verkis la konatan bildstrion pri Flash Gordon. Harrison estas interesa por esperantistoj ne nur ĉar li mem estas konvinkita esperantisto, sed ĉar li en preskaŭ ĉiu sia romano mencias Esperanton. Tiel li dum jardekoj allogis milojn de siaj legantoj scivoli kaj peti pliajn informojn pri la lingvo.

En Aŭgsburgo la Komitato de UEA elektis sinjoron Harry Harrison membro de la Honora Patrona Komitato.

Konata heroo de Harrison estas „The Stainless Steel Rat" (la Korodimuna Ŝtalrato), kiu alportis al serio de romanoj tute apartan humuron. La sekva ekzemplo de humura stilo de Harrison venas el lia verko The Stainless Steel Rat Wants You! *(La Korodimuna Ŝtalrato deziras vin!, Toronto, 1979; p. 37), en kiu invadas aroj da naŭzaj, ŝlimaj, malbonodoraj, mensosuĉaj estafoj de nekonata planedo:*

„Mi solvos ĉiujn viajn problemojn por vi, kiel mi faris en la pasinteco, sed mi devas peti vian helpon por tio. Kiom da diversaj specioj de eksterteranoj vi jam malkovris?"

„Tricent dek du. Sed kial...?"

„Mi diros al vi post momento. Ĉiuj grandecoj, formoj kaj koloroj?"

„Nepre kredinde! Vi devus vidi miajn ĥimerojn."

„Ne, dankon. Vi sendube malkovris la lingvon, kiun ili uzas por komuniki unu kun la aliaj. Ĉu ĝi estas malfacila?"

„Vi jam parolas ĝin. Ĝi estas Esperanto."

„Ne blagu, Kojpu!"

„Ne kriu al mi tiutone!" li diris ĥisterie. Poste li sukcesis ekregi sin, glutis pilolon kaj tremis. „Kial ne? Ili evidente observis nin dum longa tempo, lernante ĉion pri ni, antaŭ ol ili invadis. Ili tiel aŭdus multajn el niaj lingvoj, poste decidis favore al Esperanto kiel la plej efika formo de komunikado, ĝuste kiel ni faris."

„Vi konvinkis min. Dankon, profesoro."

Geoffrey Sutton: *Vi nun loĝas en Irlando. En kiuj aliaj landoj vi loĝis, krom en via naskiĝlando, Usono?*

Harry Harrison: Mi iris al Meksikio en 1956, ĉar mi volis sendependiĝi kiel verkisto. Jaron poste mi iris al Britio, poste Italio, kaj kiam mi vendis mian unuan libron, al Danlando en 1959, ĉar mi verkis artikolojn por dana revuo. Ni intencis pasigi unu monaton tie, sed restis sep jarojn. Ĝi estas belega lando por infanoj. Ni tiam havis unu ĵus naskitan infanon. Tie niaj junaj infanoj komencis paroli la danan.

Sutton: *Vi menciis, ke vi vendis vian unuan libron.*

Harrison: Mi vendis ĝin kiel felietonon al la gazeto *Astounding Stories* (Mirigaj historioj). Komprenu, ke en la kvindekaj jaroj tute ne aperis libroj de sciencfikcio. Verko povis aperi nur kiel gazeta felietono. Mi vendis ĝin al la gazeto kontraŭ 2 100 usonaj dolaroj, dum mi vivtenis min per tri mil dolaroj jare. Poste, kiam oni komencis eldoni specialajn poŝlibrojn, mi vendis verkon kiel poŝlibron. Tiu estis *Deathworld* (Mortomondo) en 1960 aŭ 1961. Post tio mi komencis



Harry Harrison verkis jam 33 romanojn. Multaj el ili enhavas propagandon por la Internacia Lingvo. (Foto de Jerry Bauer)

verki kaj vendi unu libron jare, ĉiun jaron. Ĉiam unue al gazeto. Sed en Britio oni kutimis proponi 50 ĝis 100 pundojn por libro. Sekvus post tio trijara tantiemo de tia nekredebla sumeto kiel du pundoj, sep ŝilingoj kaj ses pencoj!

Poste ni reiris al Usono, ĉar mi opiniis, ke la infanoj devus vidi sian propran landon. Ili jam parolis la anglan kun dana akcento. Sed mi ne povis toleri la vivon tie, do mi reiris al Britio... poste al Irlando.

Sutton: *Kial allogis vin ĝuste la sciencfikcio?*

Harrison: De la aĝo de kvin jaroj mi estas leganto de sciencfikcio. Post la milito mi studis grafikan arton kaj mi tiel ŝatis sciencfikcion, ke mi ilustris por ĝi librokovrilojn kaj gazetojn. Dum tiu tempo mi ekkonis la redaktorojn.

Sutton: *Ĉu vi aŭtoris alispecajn verkojn?*

Harrison: Mi verkis 33 romanojn. Tiuj, kiuj ne estas sciencfikciaj, estas elĉerpitaj, do ĉirkaŭ 31 estas nun aĉeteblaj. Mi verkis diversspecajn krimromanojn, ankaŭ la libron *Stonehenge*, kun amiko-antropologo, pri la demando, kiuj konstruis tiun prehistorian ŝtonaron en suda Anglio kaj kial. Mi verkis ankaŭ multe da sciencfikcio por gejunuloj, kiuj tre kontentige vendiĝas.

Sutton: *Vi estis la unua prezidanto de Monda Asocio de Verkistoj de Sciencfikcio. Ĉu vi povas diri ion pri tio?*

Harrison: En internacia kunveno de sciencfikciaj verkistoj mi proponis, ke

„En niaj manoj la steloj", Londono, 1981

ni fondu oficialan organizaĵon, ĉar tiaj renkontiĝoj kutime estas nur por legantoj. Ĝia oficiala nomo estas World SF (Monda sciencfikcio), kaj ĉiaj profesiuloj en iu ajn branĉo de la sciencfikcio povas aliĝi. Ĝi estas tre internacia organizaĵo kun ĉirkaŭ 200 membroj, sed sciencfikcio estas usona inventaĵo. Ekzistas alinacia sciencfikcio, sed ĝi ne estas tiel populara kiel la usona. Mi proponis, ke oni uzu Esperanton, sed ĉiuj kriis „La angla, la angla", ĉar ili jam uzis tiel multe da tempo por lerni ĝin.

Sutton: *Kiel vi unue renkontis Esperanton?*

Harrison: En la armeo. Mi havis tre tedan okupon kiel artileria instrukciisto en Teksaso dum la Dua Mondmilito. Varmegaj tagoj, ĉirkaŭ 50 gradoj celsiusaj, kun kanonoj pafantaj, duonsurda en ambaŭ oreloj. Tute enuige! Do de armeano, kiu estis esperantisto, mi aĉetis 27-lecionan lernolibron. Sekve, en 27 semajnoj mi lernis Esperanton en la armeo! Mi korespondis, sed mi ne aŭdis eĉ unu parolatan vorton ĝis post la milito en Novjorko.

Sutton: *En kiom da ekzempleroj kutime aperas viaj verkoj?*

Harrison: Mi ĝojas, ke la nombro altiĝas ĉiujare. Se doni unu ekzemplon de romano pri la Korodimuna Ŝtalrato, cent mil ekzempleroj en Usono kaj po dek mil en Britio kaj FR Germanio. De mia nova libro *West of Eden* (Okcidente de Edeno), kiu nun furoras, la publiko aĉetis 38 000 binditajn ekzemplerojn, do mi antaŭvidas broŝuritan eldonon de miliono aŭ duonmiliono da ekzempleroj... kaj tio vere ŝanĝas la vivon de verkisto.

Sutton: *Kaj en kiom da lingvoj aperis tradukoj de viaj verkoj?*

Harrison: Dudek unu. Nur du en Esperanto. La pasintan Zamenhof-tagon Esperanto-Asocio de Irlando eldonis la tradukon *La verda estonteco,* kiu estas novelo de ĉirkaŭ 20 paĝoj.

Sutton: *Via verko* Make Room, Make Room *(Faru spacon, faru spacon!) fariĝis la filmo* Soylent Green *(Soja verdaĵo), en kiu rolis i.a. Charlton Heston. Ĉu vi ŝatus iom rakonti pri tio?*

Harrison: Nu, ĝi temas pri la diferenco inter etoso kaj etiko – oni povas ŝanĝi sin, kvankam oni ne povas ŝanĝi la aliajn. Mi estas konscia, ke ni frontos problemon de tro granda loĝantaro kaj manko de nafto. Ĝi estas tre realisma romano, ne tre sciencfikcia, pri la kolapsinta socio de Novjorko en la jaro 2000. La filmkompanio MGM trovis ĝin, sed volis enmiksi kanibalismon! Tio donas ideon pri la funkcio de la mensoj de filmreĝisoroj! Mi laboris kun la reĝisoro kaj provis formi la filmon. Mi dirus, ke ĝi estas duone sukcesa.

Sutton: *Mi aparte ĝuis vian libron* In Our Hands the Stars *(En niaj manoj la steloj), kiu priskribas i.a. la problemojn, kiujn frontas malgranda nacio – la dana, kiu neatendite akiras antaŭiran pozicion en la spacesplorado. Mi scivolas, ĉu via intereso pri la potencrilatoj inter grandaj kaj malgrandaj nacioj iel devenis de via esperantisteco.*

Harrison: Jes, absolute. La grandaj landoj kaŭzas la problemojn. Verŝajne ne la danoj komencos trian mondmiliton. Kvankam miaj libroj estas aventuraj romanoj, ili ĉiuj havas ian moralan lecionon. Rilate miajn nun ses

Germanlingva eldono de „Faru ŝtalraton prezidanto", Munkeno, 1984

librojn pri la Korodimuna Ŝtalrato, oni komentis: „Jen Harrison denove predikas, ke oni ne mortigu homojn", kvazaŭ ne estus io malĝusta pri tio ! Ili estas pitoreskaj romanoj – la kanajlo kiel heroo, sed la Rato neniam mortigas iun. Li priskribas sin kiel scienca humanisto.

Sutton: *Esperanto ŝajne ludis gravan rolon en la frua sciencfikcia movado en okcidenta Usono. Kia estis tiu rolo?*

Harrison: Estis iom da interkovro, kiam Esperanto unue venis al Usono. Legantoj de sciencfikcio interesiĝis, kaj troviĝis grupoj da legantoj de sciencfikcio kaj esperantistoj, sed la milito mortigis tion. Ĉiuj disiĝis en la armeon. Post la milito tiuj grupoj neniam rekuniĝis. Mi kaj Forrest J. Ackerman estas la solaj du el la 450 membroj de Science Fiction Writers of America (Sciencfikciaj verkistoj de Usono), kiuj parolas Esperanton.

Sutton: *Vi skribis, ke ĉi tiu intervjuo estas la unua fojo en via 42-jara verkista kariero, kiam la esperantistoj interesiĝas pri via laboro. Se oni pripensas, ke vi efike allogis al la movado multajn novulojn dum tiel multaj ja-*

roj, kio estas via opinio pri la sinteno de la esperantistoj?

Harrison: Ili simple estas du apartaj mondoj. Sciencfikcio estas mia profesio, kiun mi ĝuas, kaj mi de multaj jaroj entuziasmas pri Esperanto. Mi mem neniam pensis vere ligi la du. Kiam mi ricevis vian leteron, mi estis iom surprizita. Poste mi pensis, ke estus interese intervjuiĝi. Mi antaŭ multaj jaroj estis tre aktiva esperantisto. Duono de la kaŭzo eble estas tio, ke mi metas la propagandon ofte en la finon de la libro. Mi supozas, ke mi ŝajnas kabineta verkisto en la Esperanto-movado kaj kabineta esperantisto en la sciencfikcia mondo!

Sutton: *Vi konas multajn verkistojn de sciencfikcio. Ĉu vi povas diri ion pri ilia nuna sinteno al Esperanto?*

Harrison: Stulta. La angloj kaj usonanoj ne scias pri lingvoj nek interesiĝas. La eŭropanoj tamen estas iom pli internaciemaj.

Sutton: *Kia laŭ vi estos la reala estonteco de Esperanto?*

Harrison: Ĝi estas simple tro inteligenta ideo, kiel la metra sistemo, kiun la usonanoj ne deziras akcepti, sed jes la eŭropanoj. Esperanto bezonas ian grandan trarompon. La esperantistoj ĉiam ĝuos siajn kunvenojn, sed ĝi estas intelekta ideo, kaj la plimulto de la homoj ne estas sufiĉe klarvida. Mi laboros por ĝi ĝis la fino.

Sutton: *Ĉu vi kredas, ke estonta longdaŭra uzo de Esperanto povus havi influon al la funkcio de la homa cerbo?*

Harrison: Kial ne? Mi dum jaroj laboris kun komputiloj unuflanke kaj Esperanto aliflanke. Mi ege ĝojas, ke la du nun estas ligitaj en la nederlanda projekto pri distribuita lingvo-traduko. Tio eble regos la estontecon de Esperanto. La komputila epoko ŝanĝas ĉiun faceton de nia vivo. Ĉi eble estos la plej bona afero de post la Unua Libro! La interesa afero pri komputiloj estas, ke ili estas la akra eĝo de la tranĉilo. Se io estas pli malmultekosta kaj pli rapida, tion oni uzas. Se ĝi ne sufiĉe helpos Esperanton, ĝi ja helpos la tradukadon! Sed ĝia nura ekzisto eble garantios la estontecon de Esperanto.

Aperis en la numero 5/1985 de la revuo Esperanto.

recenzoj recenzoj recenzoj recenzoj

Legindaj artikoloj de fama pedagogo

Vortoj de Andreo Cseh: 66 kolumnoj, verkitaj de Andreo Cseh en la jaroj 1935-1936. Editoris Ed Borsboom. Eldonis: Artur E. Iltis, Saarbrücken Societo Andreo Ĉe, De Bilt, 1984. 14 x 20 cm. 210 p.

Nenio estas pli mortinta ol ĵurnalo de hieraŭ, oni diras. Tamen Ed Borsboom faris gravan servon al ni, revivigante 66 artikolojn, kiuj aperis antaŭ 50 jaroj en Esperanto en la kolumnoj de la grava nederlanda ĵurnalo „Haagsche Post". Ili estis verkitaj ĉiusemajne en bona simpla stilo de eminenta instruisto de Esperanto, Andreo Cseh, hungara katolika pastro, kies familio loĝis en Rumanio. De tiu lando li transiris al Ĝenevo kaj fine al Nederlando, kie li fondis la Internacian Cseh-Instituton kiel centron por la fama rektmetoda kurso, kiun li verkis, kaj por la influa revuo, „La Praktiko", kiun li fondis kaj redaktis.

Liaj artikoloj ankoraŭ estas tre interesaj, donas historion kun anekdotoj de nia movado dum la du jaroj 1935 kaj 1936 kaj ankaŭ antaŭ tiam, kaj ofte pritraktas ankoraŭ aktualajn temojn, ekz. ĉu la celo de niaj kongresoj estu serioza laboro aŭ plezuro por turistoj; ĉu la disvastigo de Esperanto estas ebla sen montro de la ideala flanko; kiel venki la fakton, ke la homaro ankoraŭ ne estas matura por gvidi sin per la racio, eĉ en sia propra plej evidenta intereso; ĉu la internaciaj sportaj konkursoj servas la interpopolan amikiĝon kaj harmonion; ĉu ĝuste tiuj popoloj lernas Esperanton plej multe, por kiuj ĝi estas malplej facila.

Lingvaj pedantoj notos, ke „Esperantisto" estas regule uzita en la libro anstataŭ la „esperantisto" de la Antaŭparolo al la „Fundamento de Esperanto". Por bazaj numeraloj Cseh aŭ la editoro enmetis streketon (ekz. mil-kvincent, dek-ses) kvankam la skribregulo estas, ke oni skribu aparte la nombrojn, kiuj adiciiĝas unu al la alia (kiel en la Fundamentaj „dek du", „tridek kvin"). Se oni uzos la libron kiel legaĵon por komencantoj, oni atentigu ilin pri tio. El la malmultaj preseraroj la plej amuza troviĝas sur paĝo 132: „makaronon kun tomata saŭco". Traduko el la angla lingvo sur paĝo 179 devus esti: „Kion ni faru per niaj vivoj? "

Edward *Ockey*

PETKO ARNAUDOV / LJUDMILA ARNAUDOVA

AMUZA MATEMATIKO POR GELERNANTOJ



SEC

Amuza libro pri „seka" scienco

Petko Arnaudov – Ljudmila Arnaudova: Amuza matematiko por gelernantoj. Helplibro por fakrondoj. El-bulgarigis: P. Arnaudov. Eldonita de Scienca Eldona Centro, kunlabore de UEA kaj HEA, 1984. ISBN 963 571 129 8. 20 cm. 99 p. Prezo: por Hungario 50 forintoj.

La geaŭtoroj deziras prezenti kelkajn pensojn pri la organizo de matemati-

kaj kunvenoj kaj pri ilia enhavo. Tiu ĉi libro povas helpi la komencantajn fakrondajn gvidantojn kaj ankaŭ la gelernantajn gvidantojn de fakrondoj. La libro jam aperis bulgare, la aŭtoro mem tradukis ĝin en Esperanto.

En la unua parto de la libro – sur ĉ. 14 paĝoj – la geaŭtoroj donas konsilojn por antaŭpreparo de geinstruistoj kaj gelernantoj, kiuj organizas la kunvenojn. La geaŭtoroj proponas 4 modelojn, kiuj konsistas el 4-5 partoj – laŭ la temoj, ekzemple: *1-a parto:* malfermo, – poste ia interesa historia prezento aŭ intervjuo kun matematikisto: *2-a parto:* konkuro dum 25 minutoj (solvo de taskoj); *3-a parto:* diskuto aŭ novaj matematikaj ludoj; *4-a parto:* tasko de konkuro, konigo de sekvaj kunvenoj, premioj kaj fermo.

En **la dua parto de la libro** (ĉ. sur 40 paĝoj) por kvar aĝkategorioj ili prezentas po 2 modelojn kun konkretaj programoj. La libro donas interesajn, ne tre malfacilajn taskojn al geknaboj de 10 ĝis 17 jaroj, kiuj vizitas la klasojn de 5 ĝis 11. La taskoj – algebraj, geometriaj, logikaj – pensigas la gelernantojn. Ankaŭ la lokaj konkuroj estas interesaj kaj ludemaj.

La bonan etoson de kunvenoj deziras certigi la historiaj indikoj kaj la al tiuj ligitaj matematikaj problemoj. La matematikajn taskojn prezentas la gelernantoj kelkfoje en teatra prezentada formo. La valoron de la libro altigas la desegnitaj bildoj pri matematikistoj kaj indikoj, kiujn ni ĝis nun ne konis, ekzemple: tial aprilo estas „la monato" de matematikistoj en Bulgario, ĉar en tiu monato estas datrevenoj (naskiĝo aŭ morto) de famaj matematikistoj: Euler, Goethe, Neper, Leonardo da Vinci. La taskoj kompreneble – plimalfaciligas laŭ la aĝkategorioj.

La libro estas bone redaktita, ĝi montras trapensitan laboron!

La tria parto de la libro (ĉ. sur 30 paĝoj) enhavas interesajn, kiujn oni povas apliki en fakronda laboro, ekzemple:

– pensojn pri matematiko kaj matematikistoj. Pli ol 40 pensojn kolektis la geaŭtoroj – ankaŭ tiuj prezentas la esploran laboron, kiujn ni jam spertis antaŭe!

– 7 versajn pri matematiko! Ĉu iu kredis ĝis nun, ke la matematiko inspiris poeton? El tiu ĉi libro ni povas ekkoni tiujn versajn!

– en ĉapitro de „Ĉu vi scias, ke..." oni trovas interesajn, historiojn, indikojn pri matematiko, pri matematikistoj. El tiu ĉapitro oni ekscias, ke Napoleono ŝatis la matematikon, kaj li nomumis la faman matematikiston Laplace ministro de internaj aferoj. Oni ekscias ankaŭ tion, ke Gauss scipovis enskribi regulan 17-angulon en cirklon. Tiuj interesaj indikoj montras ankaŭ tion, ke multaj matematikistoj jam june atingis gravajn malkovrojn!

La libro enhavas ankoraŭ 60 taskojn kaj demandojn por konkuroj, rakontojn pri la matematikistoj Apolono kaj Descartes. Fine – sur 10 paĝoj – oni trovas la solvojn de la taskoj.

La 100-paĝa libro helpas ekŝatigi la matematikon tre riĉe, multflanke. La geaŭtoroj kolektis sukcese multajn interesajn el la matematiko, pri la matematiko. Tiuj, kiuj lernas kaj instruas matematikon, bone povas uzi tiun ĉi libron en sia laboro. En iu ajn lando oni povas apliki ĝin al siaj specialaj fakrondaj laboroj!

Sed kiu ajn povas legi ĉi tiun libron, ĉar ĝi estas interesa legaĵo ankaŭ por tiuj, kiuj ne lernas, ne instruas matematikon – nur ili deziras ekscii ion pri la mondo de matematiko, pri la laboro de matematikistoj.

Viktória *Balogh*

Fabeloj ankaŭ por vi

Elek Benedek: Hungaraj fabeloj. El la hungara tradukis: Maria Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983. Dua eldono. Ilustrita de Ida Csáky. 72 p. 21 cm. ISBN 963 571 118 2. Prezo: 10,20 ned.gld.

En miaj manoj mi tenas la duan eldonon de hungaraj fabeloj. La libron verkis Elek Benedek, konata en Hungario kiel fondinto de la landa porinfana literaturo. En la postparolo, kiun tre koncize faris la tradukinto mem, sinjorino Maria Benczik, ni legas pri la verkisto, kiu vivis inter 1859-1929 kaj postlasis al sia popolo la grandiozan verkon, kiu aperis en kvin volumoj inter la jaroj 1894-96 sub la titolo „Hungaraj fabeloj kaj legendoj". Tiu ĉi verko atingis sinsekve sep eldonojn en pli ol duonmiliono da ekzempleroj.

En ĝi ni renkontas la ruzan vulpon kaj lian amikon ne malpli ruzan lupon; ke ili ĉe la fino de la fabelo fariĝos malamikoj la leganto tute ne surpriziĝas. Vi legos pri malriĉa ĉarmulo, la ĉioscianta Joĉjo, kiu pro sia saĝo akiras la reĝidinon, sed... ne, tute ne, mi ne rakontu al vi pri multaj frandaĵoj de la ceteraj 8 rakontoj, ĉar vi nepre devas mem la libron gustumi.

Ĝia facila kaj flua stilo alportos al vi agrablajn horojn dum kiuj vi troviĝos meze de la fabela mondo, kiu ne estas nur la regno de infanoj, sed ĝi apartenas ankaŭ al plenkreskuloj, al tiuj, kiuj konservis en si mem la fantazian mondon de sia propra infaneco.

Al la infanoj, al kiuj, cetere, ĝi estas destinita, ĉi bela verko estu la fonto el kiu ili ĉerpu ne nur la facile atingeblan lingvoscion, sed ankaŭ la saĝon de la hungara popolo.

Zora *Heide*

Gvidilo tra ĉinaj urboj

Dek ses urboj de Ĉinio. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo. Feniksa Libraro. 18,5 cm, 176 paĝoj, plus 16 koloraj kaj 32 nigre-blankaj fotopaĝoj.
Prezo por Hungario: 80,- forintoj.

Oni bone scias el statistikoj, ke Ĉinio estas „vilaĝa lando", t.e. la plimulto de la ĉina loĝantaro loĝas en vilaĝoj, tamen, la diversajn aspektojn de la ĉinaj kulturo kaj tradicioj oni povas renkonti en la urboj. Tial estas tre bonvena la apero de tiu ĉi gvidilo, kiu donas koncizan sed informriĉan prezenton pri dek ses ĉinaj urboj. La tekstan prezenton agrable kompletigas la belaj fotoj, kiuj sukcese kaptas la karakterizajn trajtojn de la pritraktitaj vidindaĵoj.

Inter la dek ses prezentitaj urboj kompreneble troviĝas ankaŭ la plej konataj, kiel Pekino (9,23 milionoj



da loĝantoj), Ŝanhajo (11,85 milionoj), Tjanĝin (7,76 milionoj), kaj same malpli grandaj kaj malpli konataj urboj, kiel Urumĉji (930 000 loĝantoj).

La priskriboj konigas la geografiajn karakterizaĵojn de la urboj, tion sekvas prezento de la historio de la urbo. La aŭtoroj donas riĉajn indikojn ankaŭ pri la ekonomia vivo, reliefigante la progreson rapidan post 1949.

Kompreneble, ĉe ĉiu urbo oni ricevas priskribon ankaŭ de la naturbelaĵoj kaj turismaj vidindaĵoj. Mi ne bezonas emfazi, ke tiajn oni trovas abunde – dum la longa ĉina historio kreiĝis amaso da belegaj konstruaĵoj.

Tiu ĉi libro sendube bone servos la venontjarajn kongresanojn en Pekino. Tamen, ili ne prokrastu tralegi tiun ĉi libron ĝis la vojaĝo: ili legu ĝin jam nun, por renkonti la belaĵojn jam havante informojn pri ili. Samtempe la libro estas interesa legaĵo ankaŭ por tiuj, kiuj ne vizitos Ĉinion: ĝi helpas konatiĝi kun la nuno kaj pasinto de foraj grandaj urboj de interesa lando.

La lingvaĵo de la libro estas simpla kaj eleganta, la grafika prezento aparte bela. V. *Benczik*

Malpermesita kritiko

Lorjak: „Eŭlalia". Originala romano. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Budapeŝto, 1984. 186 p. 21 cm. Prezo: 21,- ned.gld.



Ne demandu min, kiu estas Lorjak, kiu kuŝas sin malantaŭ tiu ĉi pseŭdonimo! Malgraŭ persone ne konate – kiel verkiston (mi supozas viron, ĉar sur la malantaŭa paĝo de la kovrilo rigardas min vira kapo kun rondaj okulvitroj – sed sen atentigo pri ties indenteco. Ĉu Lorjak?) oni konas lin bone. El lia verkista plumo elfluis „Neologisme", „Transe", „Retoj", „Regulus" kaj „Iluzioj".

Ankaŭ ne demandu min, kiu estas Eŭlalia. Mi eksciis tion, sed mi ne volas forpreni vian scivolemon ! Atendu la rezulton de via memstara legado... estos surprizo!

Surprizo estis – krom la ekscita enhavo de tiu ĉi krimromano – por mi multo alia. Tiel la manipulado de la Lingvo Internacia. Lorjak trovis vortkunmetaĵojn – parte amuzajn, sed ankaŭ parte konfuzajn. Ekzemplo por la lasta konstato: „Ĉu do je la *nunioma* horo vi ankoraŭ ne tagmanĝis? " (Estis cetere unu el la tre maloftaj kazoj, en kiu Lorjak komence de demandfrazo uzis la demandpartikulon – plej ofte ĝi mankas!). Oni jam devas cerbumi por ekkoni la sencon de *„nunioma"* pere de kunteksto!

Alia ekzemplo: „Do, ŝi rezignacie konsentis akcepti la pruntitan piĵamon, kaj pasi *de sur al en* la liton." Kvar sinsekvaj prepozicioj – tiaj enigmaj taskoj ne plialtigis mian legoĝojon!

Ankaŭ mi perceptis kelkajn ĝenantajn parolturnojn, kiuj supozeble havas sencon en la nacia lingvo de Lorjak – sed la leganto esperantista en iu ajn lando ne kapablas tuj kompreni ilin. Sur paĝo 9 troviĝas: „... kiam aperos iu kun okulo en nigra kompoto..." Ni, germanoj, versaĵne dirus, ke iu posedas „bluan okulon" – sed kiu povu kompreni tion ekstergermane?

Lasta reklamacio, rilatanta al la tipografo, kiu grafike aranĝis la tuton. Post legado de la unua triono de la firme bindita libro, mi ekhavis problemojn, ĉar la kompostitaj linioj malaperis en la mezan randon de mia libro. Nur perforte mi fleksis la libron (kia postulo de libroamiko!) por ke mi povu daŭrigi mian legadon. Necesus alia kompostformato – kaj jam oni povus fari el mi preskaŭ kontentan leganton!

Do, resume: Kiu ne sin ĝenas pri la nomitaj malperfektaĵoj certe povos bone amuzi sin per tiu „Lorjak-aĵo". La verkisto, sur la lasta paĝo, memorigas siajn legantojn per postparolo (la plej mallonga, kiun mi legis ĝis nun): „Ne protestu. Vi estis avertitaj." Kaj tiaj vortoj, kiuj rilatas al la antaŭparolo de la libro, malpermesas ĉiujn kritikojn! Ĉu jes aŭ ne?

Joachim *Schulze*

MONTARA VILAĜO

CHUN-CHAN YEH

ĈINA ESPERANTO-ELDONEJO

Realisma epopeo

Chun-chan Yeh: Montara vilaĝo. Romano. El la angla tradukis William Auld. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. Serio Oriento-Okcidento n-ro 21. 264 p. 21 cm. Bindita. Prezo por Hungario: 160,- ft

La aŭtoro de tiu ĉi romano debutis kiel esperantista verkisto en la tridekaj jaroj: sub la nomo *Cicio Mar* li aperigis la rakontaron „Forgesitaj homoj". Dum kaj post la milito li vivis la vivon de socie engaĝita ĉina intelektulo: lian personan vivon stampis la sorto de la granda nacio, al kiu li apartenas.

Pro sia abunda eksterlanda restado li tre bone ellernis plurajn lingvojn, kaj transplantis multajn ĉefverkojn de la monda literaturo al la ĉina lingvo. La anglan lingvon li alproprigis tiel bone, ke la romanon „Montara vilaĝo" li verkis rekte en ĝi, kaj la verko atingis rimarkindajn sukcesojn en la anglalingvaj landoj. Nun dank' al la ĝue legebla traduko de William Auld ankaŭ la esperantistaro povas konatiĝi kun tiu ĉi romano, kiu kondukas nin en la dudekajn jarojn, kaj prezentas al ni, kiel travivis ĉinaj vilaĝanoj la tumultan historian periodon antaŭ la revolucio de la 1927-a jaro.

En la jaro 1911 la imperiestra dinastio Qing (ĉin) estis detronigita, kaj Ĉinio fariĝis respubliko. La grandega lando, dum longaj jarcentoj vivinta en preskaŭ absoluta senmoveco, travivis pli da ŝanĝoj dum unu jaro, ol dum jarcento antaŭe. Tiuj ŝanĝoj kompreneble ne plene atingis la forajn, malgrandajn vilaĝojn, tamen sufiĉe por decide interveni en la vivon de la simplaj homoj.

Kaj la detronigo de la dinastio kaj la proklamo de la respubliko estis fakte nur la uverturo de la ŝanĝoj. La spirito de la socia novigemo liberiĝis el la botelo, kaj la progresemaj fortoj de la nacio ekluktis por plene likvidi la restaĵojn de la feŭdismo kaj krei pli justan sociordon. Chun-chan Yeh prezentas al ni, kiel tiu ĉi procezo respeguliĝis en la vivo de malgranda montara vilaĝo.

La historiaj kaj sociaj eventoj tamen estas nur fono de la romano: la veraj protagonistoj estas la homoj. Ni ricevas paradan revuon de memorindaj personaĵoj, kiuj verŝajne estas tre tipaj, tamen ili havas tiom da tute individuaj trajtoj, ke legante la romanon oni ne pensas pri iaj sociaj-historiaj konkudeblaĵoj.

Laŭ Liŭ, la vilaĝa rakontisto, Onjo Krizantemo, longe kaj fidele atendanta sian foririntan edzon, Mintunon, Onklo Pan, silenta maljunulo, kiu venis el fora regiono en la montaran vilaĝon, Benĉin, la taoista pastro, kiu pro sia maljuneco ne volas akcepti la teron, kiun donas al li la revolucio, la poltrone malkuraĝa Maŭmaŭ, la mizera instruisto Onklo Pejfu kaj ankoraŭ multaj aliaj estas tiel trafe bildigitaj, ke eĉ Eŭropa leganto povas senti ilin kvazaŭ palpeble realaj kaj korproksimaj.

Mem la agado, kiun la aŭtoro prezentas en mi-formo, estas senpatose ĉiutaga. Ni konatiĝas kun la ĝojoj kaj malĝojoj, virtoj kaj malvirtoj de la vilaĝanoj – la historiaj eventoj ĉe la komenco aperas nur kiel aferoj foraj, ne rekte influantaj la veran vivon, por ĉe la fino de la romano kun kruda kaj kruela realeco perturbi ĉion, kion ĝis tiam oni sentis stabila. La prezentmaniero, kiun aplikas Chun-chan Yeh, parencas al tiu de Ŝolohov en la romanego „Silenta Don": la nete realismaj, senpatosaj, preskaŭ-banalaj scenoj kunplektiĝas je sortoformanta epopeo, akiranta vastan simbolan signifon. Tiun ĉi prezentmanieron mi trovas la plej grava valoro de la romano, ja tiel ĝi estas atentoĉena, multloke eĉ humura legaĵo, en kiu kavalkadas aro da ŝatindaj figuroj, kaj samtempe ĝi raportas aŭtentike pri sortodecidaj jaroj de granda popolo.

La aŭtoro, vivinte longe en Eŭropo, kapablas prezenti la ĉinajn homojn kaj eventojn „digesteble" por Eŭropano: tial la romano legiĝas tre facile. Tre karakterize ĉinaj konceptoj aperas nur sporade, kaj ili estas koncize sed trafe piednotitaj.

La tuton de la romano karakterizas ia ŝveba naiva ĉarmo: tio bone respeguliĝas ankaŭ en la lingvaĵo de la traduko – Auld uzas klasikan Esperanton, evitas rafinitajn neologismojn, kiuj ja povus detrui la etoson de naiveco. Tiu simpla lingvaĵo aldone havas ankaŭ la avantaĝon, ke la romano estas rekomendebla ankaŭ al nespertaj legantoj.

„Montara vilaĝo" estas verko leginda por ĉiuj: al ĝiaj kvalitoj aldoniĝas ankaŭ la tre bela grafika prezento, kiu faras la libron dekoro de ĉies librobreto.

V. *Benczik*

Bona koro valoras pli ol oro

Bonkora Ŝjaudon. Bildlibro. Bildoj kaj teksto de Mej Jing. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 20,5x18,5 cm. 60 paĝoj.
Prezo por Hungario: 50,- forintoj.

„Bona koro valoras pli ol oro" – tiun proverbon skribis dediĉe s-ano Li Ŝiĝjun, membro de la Akademio de Esperanto, en la donacekzempleron, kiun en Pekino li transdonis al mi por mia filineto kaj fakte, ĝi tre bone esprimas la kernan penson de tiu ĉi tre bela bildlibro.

Ŝjaŭdon estas ujgur-nacieca knabo, kiu vivas kun sia onklo kaj vivtenas sin per fiŝkaptado. Pro bonkoreco li liberigas grandan kaptitan fiŝon, kaj la onklo kolere forpelas lin. Poste li spertas multajn aventurojn, travivas danĝerajn situaciojn, sed ĉiam li saviĝas, ĉar dank' al sia origina bonkoreco li havas sindonajn amikojn, kiuj en la krizaj momentoj helpas lin. Per la helpo de la amikoj fine li eĉ gajnas la manon de riĉa reĝidino, sed li ne volas edziĝi al ŝi, ĉar la reĝidino montriĝis malica kaj malbonkora. Li preferas resti kun siaj sindonaj amikoj.

La tre bele pentritaj bildoj, la konciza, facila kaj agrable fluanta teksto kaj la pedagogie pozitiva enhavo promesas agrablan legplezuron por ĉiu aĉetonto.

V. *Benczik*

GAJA PAĜO



Internacia legolibro

– Mia kara meksikano – karesas dumkongrese brunan junulon ĉarma samideanino – mi bone legas en viaj okuloj!

– Ĉu vere? Kaj nun kion do?

– Ho, mia Lopez, vi volas proponi geedziĝon al via amata Hedviga!

– Mi falis el la ĉielo! Vi estas analfabeta!

Festeninda

– Antaŭ du monatoj mi disiĝis de mia fianĉo. Kaj imagu: depost tiam oni vidas lin ĉiutage ebria!

– Strange! Ĉu tiel longe li festenas?

La dua monato

– La miela monato jam finiĝis ĉe la novaj geedzoj Lesko.

– De kie vi scias tion?

– Facilas: la edzineto jam ne helpas sian edzon dum la telerlavado.

Dum postaj monatoj

– Laŭ mi, venas okazoj, kiam la edzo devas mensogi al la edzino.

– Certe, sed okazas eĉ pli malbone: kiam li devas diri la veron!

Pli-pli poste

– Ĉu estas vero, sinjorino, ke vi trifoje kokris vian edzon? – demandas juĝisto.

– Jes, sinjoro. Sed mi povas mencii cent okazojn, kiam mi restis fidela al li...

In-verse

– Mi eĉ unu vorton ne diris, kiam mia edzo kokris min kun virinoj pli belaj ol mi – aŭskultas ŝian plendon la amikino, kaj ekmiras:

– Do kial vi indignas nun?

– Ĉar li jam kaptas ankaŭ la pli malbelajn!

Je malfrua nokt'

Malgraŭ la pasintaj horoj la gastoj sengene babiladas, kvazaŭ fiksitaj al la seĝoj. La dommastrino, laciĝinta, volas instigi ilin foriri. Abrupte ŝi ĝentilas:

– Kion mi priservu nun: ĉu brandon, kafon, eventuale taksion?

Kaj jen la puno

– Dum ni gastis ĉe amikoj, ŝtelisto forportis ĉion valoran el nia loĝejo!

– Ege bedaŭrinde... tamen pro la asekuro oni kompensos vin.

– Vane! La ŝtelisto eĉ dresis nian hundon por ke ĝi mordu nin kiam ni hejmenvenos!

Demandu, profesoro!

– Studento! La pacienton trafis kuglo ĉe la maleolo, pro kio li lamas. Kion vi farus?

– Ankaŭ mi lamus.

Sanega ulo

– Doktoro! Mia frunto pulsegas ĝis kapturniĝo! Mia flanko pike doloras, la stomako spasme kirliĝas, mia lumbo kiel plumbo. Kaj mia koro batas-frapas kvazaŭ lokomotive...

– Mi envias vin! – respondas la kuracisto. – Vi devas esti ege sana, se vi eltenas ĉion ĉi...

Trankvilon!

– Sinjorino, via edzo bezonas nepre trankvilon – diras kuracisto. – Mi do preskribas trankviligajn, tablojdojn, jen!

– Kaj mia edzo kiom da ili li devas preni, doktoro?

– Vi eraras, sinjorino. Ne por via edzo mi rekomendas la tablojdojn, sed por vi...

Pacienca paciento

– Mi timas de la operacio, doktoro! Ĉu mi rajtas esperi?

– Vi estos la 49a kiun mi operacios pro la sama malsano.

– Do tiam mi iĝas tute trankvila.

– Tre bone, iam la operacio devos jam sukcesi!

Apendico al nia paĝo

– Ĉu vi volas vidi, kie mi estis operaciita pro apendicito? – demandis fraŭlino de la amindumanto.

– Nepre, karulino, mi volas vidi... – respondis avide la junulo.

– Nu, tiam rigardu supren al tiu granda hospitalo, al la sepa etaĝo dekstren, malantaŭ la tria fenestro tio estis okazinta...

Ervin *Fenyvesi*



Omaĝe al Attila József (1905–1937)

ni citas 6 poemtitolojn de li, kiuj aperis en la (dua) Hungara Antologio, 1983. Vi trovos ilin en la ensendendaj linioj: V.1., H.3., H.8., V.20., H.42. kaj H.70.
Limdato: du monatoj post la ricevo de la revuo.

Horizontale: **1.** Budapeŝta Informilo; **14.** Akrobata insekto (R); **15.** ...Maria Rilke (poeto); **16.** Trinkaĵo el herbo; **17.** Absoluta, kruela regnestro (R); **18.** Ensendu la...; **19.** Malnova lumigilo (R); **21.** Diareo (R); **22.** Platfunda ŝipo, ero de flosponto (R); **23.** Senharare; **24.** Reen: koncepto, imago (R); **25.** Konsonanto fonetike; **26.** ...Bull: simbolulo de Grandbritio; **27.** Havanta guston de natria klorido; **29.** Komparativa konjunkcio; **30.** „ ...mia kor'"; **31.** Mezurunuo de longo en Britio; **33.** „ ...Brava": poemo de Petőfi, kiun tradukis Kalocsay; **36.** Peno ne renkonti; **38.** Tre konatan personon; **40.** Aŭdigi sonojn sen harmonio (R); **41.** Paroli kapre; **43.** Unu el la gepatroj (R); **44.** Membro; **45.** La unuan (antikvan) lumturon; **46.** Unujara herbo, utiligata por fadenoj (R); **47.** Vestaĵo de soldatoj k.s.; **49.** Regula maniero; **50.** Prepozicio; **51.** Erpi sen vokaloj! ; **53.** Sin movis; **54.** Multekosta; **56.** Tabelvorto; **57.** Ludkarto kun ruĝaj koroj (R); **58.** Svinga movo por eksalti; **60.** Akompani; **61.** Rilata al brikaĵo, ĉirkaŭanta ejojn; **62.** Malfaciligo, malhelpado; **63.** Hejtilo (R); **64.** Nord-oriento; **65.** Laŭtega alarmil'; **66.** Persona pronomo; **67.** Malnova nomo de Irano; **69.** Karbonido (R).

Vertikale: **2.** Epopeo de Homero; **3.** Purigi kultivatan grundon; **4.** Reen: kontentiga per manĝo; **5.** Riverego en Siberio (sen finvokalo); **6.** Popularaj sovaĝbestoj; **7.** Reĝaj foteloj; **8.** ...io, iama Balta provinco; **9.** Unuiĝintajn Naciojn; **10.** Kiel V.5.; **11.** Duono de krio! ; **12.** Ringoforma insulo, formita de koraloj (R); **13.** Konektanta cerbon kun aliaj korpopartoj; **19.** Kartoj restantaj sur la tablo post disdono (R); **22.** Loĝanto de Mez-Eŭropa lando; **23.** Akvaj vegetaĵoj; **25.** Konsulti la sorton; **27.** Granda, eleganta ĉambro; **28.** Ano de Balkana popolo; **31.** Migranta bird'; **32.** Fordonos ion por ies utilo; **34.** Mara ondomovo; **35.** Ne natura; **37.** Invito por vizito; **39.** Amegi, ekzemple Dion (R); **42.** Fifama Sicilia bando; **43.** Mallarĝa tervojeto; **45.** Neĝo, firmiĝinta en glacio; **46.** Eligi akran sonon; **48.** Riverego en Sud-Ameriko (sen finvokalo); **50.** Nuligi, mortigi (R); **52.** Komplete, sen ia manko; **54.** Koncerna ekz. E-lecionojn; **55.** Fari specialan paŝon en ŝakludo; **57.** Ne rekta; **59.** Homa psiko (R); **60.** Surkapa kreskaĵo de kelkaj bestoj; **61.** Tropikaj blankaj floroj (R); **63.** Koncerna fabelan inon; **65.** Prudenta, klera (R); **67.** Ofta greka litero en la fiziko; **68.** Verba finaĵo.

I.Z.

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1985/3:

„Ni junaj ne toleru plu la honton,
ke oni al ni rabas la estonton." (W. Auld)

Premion gajnis per lotumado: Linde *Knöschke,* Berlin, GDR; Wáclav *Pospišil,* Jablonec n.N. CS kaj Kurt *Rohdin,* Skövde, S. La redakcio petas pardonon de tiuj gajnintoj, kiuj prokrastite ricevis la libropremion pro administraj eraroj. Nun la ekspedado okazas denove senĝene.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov
Sur kampo granita
de István Nemere

Per la romano „Sur kampo granita" István Nemere rememorigas nin, ke la punebleco de la militkrimoj tute ne ĉesas. La aŭtoro priskribas la pensojn kaj sentojn de nazia militkrimulo, kiu post 25 jaroj revenas en la vilaĝon de sia krimago.

1. Kio estas la nomo de la vilaĝo, kie oni ekzekutis italajn kamparanojn?
2. Kio deziras fariĝi Carla post la milito?
3. Kian oficiran rangon havis Martin Dregger?

Limdato por respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvoj de la demandoj en la n-ro 1985/3:

1. La moknomo de la submastro Hipolit Eratur estas Treponem.
2. Sur la dorso de la fotobildo legeblis: „telefonos je la tria matene."
3. Kiki Zanzibar gvidis inspektoron Leonard al Jules.

Premion gajnis per lotumado: *Madarász* Gyula, Debrecen, H: Wieslaw *Ponczek,* Gdansk, PL. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

Eva *Nollova* (18) pri muziko, filmo, teatro, sporto, naturo; kol. bk de artistoj, gr-diskoj. *Kolin* II. Miru 611, CS-28002. – Gintaras *Žiaunys* (19) pri muziko, bk, filatelio, E-mov, lingvoj. *Mažeikiai,* Žemaltijos 9-25, Litovio, SU-235.500. – Marina *Emeljanova* (32) inĝenierino pri muziko, arto, pentrado, bk, k.a. *Klajpeda,* Simonajtites 23-95, Litovio, SU-235.822. – Rima *Markevičiúté* (24) inĝenierino kun plumamikoj el Hungario aŭ aliaj landoj. *Vilnius*-57, Ateities 9-515, SU-Litovio. – Emil *Andreev* (40) instruisto, pri kino, turismo. *Silistra* Donĉev-bl-Roza 2, 4/11. BG-7500. – Ginka *Minĉeva* (29) kuracistino, *Silistra,* J. Todorov-38, bl. Javorov 3, 4/12. BG-7500. – S-ino Veselka *Nenceva* (30) kun virinoj pri literaturo, muziko, naturo ktp, kol. bk-urboj, E-revuoj, modrevuoj. *Sevlievo,* Panajot Kovaca 3, BG-5400. – Zdenek *Kolensky,* pri popola vivo, turismo, naturo, kol. pm, moneroj. *Horovice,* Dlaždéná 954. CS-26801. – Anatolio *Dovbisch* (42) fraŭlo precipe kun hungaroj, kol. bk de katoj-hundoj, kalendaretoj, E-glumarkoj, ekslibrisoj. *Sumek,* Sostka 7, POB 27, Ukrainio, SU-245.110. – Janusz J. *Olzbrzymek* (30) ktm, pri historio, geografio, literaturo, sci-fikcio, distra muziko, k.a. kol. bk, pm. *Kraków* 42, Pf. 54, PL-30-964.
Studentino *Šeduikyté* Rita (18) ktm, *Utena,* Spalio 50. gt 68-12. Litovio SU-234.910. – Instruisto *Lukoševičius* Kazimieras kun italoj, japanoj, hindoj, aŭstralianoj. *Saldutiškis,* Litovio SU-234.900. – Ĉe sama adreso ankaŭ 14-17 jaraj gekursanoj, kol. pm, bk. – Instruistino (27) kun edzo (30) pri turismo, artoj, lingvoj, multe vojaĝantaj, amantaj naturon. Hanna kaj Józef *Brejnak, Lowicz,* ul. Broniewskiego 4/47, PL-99-400. – *Dedkova* Irina (20) pri antikva historio, pentrado, kino. *Saratov,* str. Sovetskaja 72/82, kv. 64. SU-410.056. – Julka *Nikova* (19) laboristino, pri sporto, danco k.a. *Silistra,* Hr. Mihajlov 10/A, BG-7500. – Tanja *Romanova* (19) vendistino, *Silistra,* 7 Septemvri 35, BG-7500. – Natali *Osminina* (28) inĝenierino, ktm, pĉt, pri vojaĝoj, foto, pentrarto, muziko, literaturo, kol. bk, pm. *Piaski,* Gabanóg 62/1, PL-63-820. – Komencantoj post kurso (17-70) ktm, pĉt. Instruistino Felicja *Kostow, Mikolów,* ul. Krótka 38, PL-43-190. – Letervesperon kun E-ekspozicio aranĝos komence de januaro granda grupo post 2a-grada kurso, serĉanta korespondantojn. Bk kaj belaspektaj leteroj. E-gazetoj k.a. atendataj, nepre respondas: PEA Vojevodia Estraro, *Wroclaw,* Dubois str. 3. Pollando. – Jerzy *Dembicki* (54) sperta e-isto kun pluraj interesoj pĉt. *Nowy Sacz,* Daszynskiego 1c/34, PL-33-300. – En norda Italio E-on lernantaj klasoj: 11- kaj 14-jaruloj kun alilandaj lernejaj klasoj, pri elektendaj temoj. Adreso: d-ro Marco *Picasso, Vedano al Lambro,* (Mi), Via De Gasperi 7, I-20057.

Esploroj pri libroj kiuj mencias Esperanton

C. Nourmont kompilas liston de nacilingvaj libroj, en kiuj aperas mencio pri Esperanto (ĉefe romanoj k.s.). Bonvolu sendi detalojn: aŭtoro, titolo, eldonejo, eldonanto, paĝo en la koncerna eldono. Se temas pri traduko, bonvolu mencii en kiu lingvo ĝi estis verkita. Se temas pri originalaĵo, prefere sendu fotokopion de la teksto.
Adreso, kie kun danko oni ricevos tiujn informojn: S-ino C. Nourmont, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgio.

estas internacia lerneja revuo, aperas trifoje jare sur 24 paĝoj; dukolora preso, ilustrita, eldonas Hungara Esperanto-Asocio, redaktas O. Knĭchal (kor. adr. Budaörs, Patkó u.3. II.19. H–2040, Hungario).

JUNA AMIKO uzas lingvon kompreneblan al ĉiu komencanto.
JUNA AMIKO konatigas kun diversaj landoj kaj popoloj pere de rakontoj, poemoj, kantoj, interesaĵoj.
JUNA AMIKO instruas kaj amuzas per facilaj tekstoj.

Abonoj: en la socialismaj landoj ĉe resp. landaj asocioj
en aliaj landoj ĉe UEA. Prezo 5,70 guld.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Arta redaktoro: **Oszkar Böhm.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Alfonso Pechan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas ĉe ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Hungara Poŝto (K.H.I. 215-96-162. 1900 Budapest József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 96,- Ft, al eksterlando por unu jaro 114,- forintoj. * Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest
Indexszám: 25 377 ISSN 0018-7704

VIA DOMMASTRO EN BUDAPEŜTO:
BUDAPEST TOURIST

La vojaĝoficejo de l'ĉefurbo

Budapest TOURIST

Uzu niajn servojn

- organizado de grupoj vojaĝoj
- organizado kaj aranĝado de kongresaj vojaĝoj
- organizado de vojaĝoj
- entreprenoj kaj premiaj vojaĝoj
- interpretistaj servoj
- servo de privataj ĉambroj

IDEGEN-FORGALOM

Turisma
Propaganda kaj
Eldona
Entrepreno

Magyar Konyha

UTAZÁSI MAGAZIN

Túrázás · Szórakozás · Üdülés

NIMRÓD

jó utat
autós magazin

Autósélet
A MAGYAR AUTÓKLUB LAPJA

NR NIMRÓD rejtvényújság

Magyar Hírek

1985 OKT 23